

Biblia Revuo



Volume I, Numero 2
1964

Redaktoro: Donald Broadribb
Melburno, Aŭstralio

Ĉi tiu kajero de *Biblia Revuo* estas reprodukto de la originalo per uzo de la optika rekon-programo Abbyy FineReader Express for Mac. La aranĝo de la teksto sur la paĝoj laŭeble reproduktas tiun en la originalo. Kelkaj komposteraroj en la originalo estas korektitaj, sed la tekstenhavo estas neŝanĝita. La tiparo uzita por la reprodukto estas Minion Pro, kiu plej similas al tiu uzita de la origina kompostinto en 1964. La enhavode ĉiu paĝo precize respondas al la koncerna originala paĝo. La kovropaĝoj estas tamen tute nove desegnitaj.

TABELO DE ENHAVO

LA MESIO-PREDIKO DE JOHANO BAPTISTO de Stefan Maul	de paĝo 1
DEK DU TEORIOJ PRI LA ALTA KANTO DE SALOMONO de George Rust	7
MODERNAJ METODOJ POR LA INSTRUADO DE SEMIDAJ LINGVOJ de A. Capell	32
LA APOSTOLO (T)ADDAJ tr. Donald Broadribb	62
POEZIO HEBREA: KELKAJ PENSOJ de Donald Broadribb	75


LA MESIO-PREDIKO DE JOHANO BAPTISTO

de Stefan Maul

Johano, la Baptisto, estis la antaŭulo kaj anoncanto de Jesuo Kristo, la Mesio. Kian imagon li havis pri la Mesio kaj kiel respondis Jesuo al tiu bildo, kiun la “vokanto en la dezerto” desegnis (al si)? Estas klare, ke Jesuo plejgrandparte ne kontentigis la atend-esperojn de la ceteraj hebreoj, ja eĉ ne de Siaj propraj adeptoj dum longa tempo; ĉu li kontentigis almenaŭ tiun, kiu publike kaj laŭte anoncis Lian venon? Nu, ni unue rigardu la enhavon de la baptista prediko pri l’ Mesio kaj poste esploru, kiom Jesuo kongruis kun tiu ĉi prediko.

Temas pri la tekstoj Mt 3:11-12; Mk 1:7-8; Lk 3:15-18; Jo 1:25-28. La plej gravan eldiron de la Baptisto pri la Mesio ĉiuj kvar evangelistoj tradicias kun ne tro grandaj diferencoj: Li mem (Johano) baptas (nur) per akvo (por penti), sed post li venos iu (resp. jam vivas inter la popolo, nur nekonata), kiu estas pli potenca ol li, al kiu malligi la rimenojn de Liaj ŝuoj (aŭ porti ilin) li ne estas inda (kapabla, taŭga) kaj kiu baptos en (per) Sankta Spirito (kaj fajro). Ĉe Jo mankas “pli potenca ol mi” kaj la baptado de la Mesio per Sankta Spirito kaj fajro, kion skribas la sinoptikuloj; sed ankaŭ ili ne tutsame: Mk ne mencias fajron kaj finas kun la bapto per Sankta Spirito, dum Mt kaj Lk aldonas “per fajro” kaj la alegoron de la draŝej-purigo.

La moderna ekzegezo ĝenerale supozas, ke la sinoptikuloj dependas de diversaj fontoj. Oni povas apliki jenan skemon:



Ankaŭ ĉe niaj tekstoj tiu de Mk verŝajne estas la origina kaj sendependa, kiun transprenis Mt kaj Lk; ili ĉerpis ankaŭ el la t.n. fonto "F", kiu estis (nun perdita!) greka traduko de (same perdita) pra-Mt en arama lingvo. (Tiun hipotezon akceptas tre multaj nuntempaj bibliistoj.) Lk, kiu ja havas la plej multajn proprajojn, ĉerpis ankoraŭ el aliaj fontoj. ⁽¹⁾ Ĉe nia ekzemplo nun tio signifus, ke Mt kaj Lk transprenis la unuan parton (ĝis la alegorio) de Mk, dum la draŝej-alegorio originas de "F". Ĉi tie ni ankaŭ trovas unu el la maloftaj Jo-paraleloj al la sinoptikuloj.

La tuta Mesio-demando aktualiĝas, ĉar la popolo aŭskultanta la Baptiston pripensis en siaj koroj, ĉu eble li estas la Mesio (tiel ĉe Lk) kaj ĉar "la Judoj sendis al li pastrojn kaj Levidojn el Jerusalemo, por demandi lin: Kiu vi estas? Kaj li konfesis kaj ne kaŝis; kaj li konfesis: Mi ne estas la Kristo." (Jo 1:19-21) Nun ili do demandis la kialon de lia baptado, kaj responde Ja Baptisto parolis pri tiu, kiu venos post li kaj baptos per Sankta Spirito. Por Jo gravas nur ĉi tiu konfeso, ke li ne estas Ja Kristo, la Mesio, sed nur la vojpreparanto kaj atestanto; ĉar en la evangelio de Jo klare montriĝas la tendenco, elstarigi la malsuperecon de la Baptisto kompare al Jesuo (supozeble en lia evangelio oni parte devas vidi apologion kontraŭ iaj sektoj aŭ Johano-adeptoj, kiuj troe gloris la Baptiston kaj eĉ asertis, ke li estas la Mesio).

Kiun imagon de la Baptisto pri la Mesio nu oni povas gajni el lia prediko? Unuarigarde estas malmulte, nenio detala kaj konkreta: Rifuzo de la ideo, ke li mem estas la Mesio; li nur estas la preparanto de ties vojo; kiam tiu estos veninta, lia tasko finiĝos, restos eble nur ankoraŭ atesti, ke tiu estas la Mesio (kp ankaŭ Jo 3:22-36). La Baptisto reliefigas la grandegan diferencon inter si kaj la Mesio, komparante sin kun sklavo, ja li eĉ opinias sin ne inda (resp. kapabla, kion unue signifas la greka "hikanos" por la plej sklaveca servo: malligi la rimenojn de Liaj ŝuoj).

Tiun diferencon li ankoraŭ ellaboras: li baptas nur per akvo (bapto por pentito), sed tiu pli potenca bapto per Sankta Spirito kaj fajro. Oni asertis, ke la Baptisto ne povis havi tian Mesio-imagon, sed vidis en Li nur la eskatologian juĝiston, kaj la bapto per Sankta Spirito estus pli posta kristana interpolado. Pruve oni citas Ag 19:1-6, kiu rakontas pri Johano-adeptoj, kiuj ne konis la spirit-bapton. Sed aliflanke oni ne pretervidu, ke la Judoj jes konis la profetaĵon de Joel (2:1-5) pri la ĝenerala spirit-elverŝo dum la fintempo kaj ke la Mesio por la Judoj estis la plej ĉefa spirit-portanto. Ankaŭ kiel spirit-disdonanto la Mesio restas eskatologia figuro, taŭga por la Mesio-imago de la Baptisto. Nur: en lia profeta perspektivo - kontraste al efektiva realo - identiĝas la unua kun la dua veno de la Mesio, de kiuj ja nur la dua alportos la mondjuĝon. La Baptisto do ankoraŭ staras en la MT-juda eskatologio, kiu konas nur *unu* venon de Mesio en potenco al la juĝado, kun kio kongruas la fino de la nuntempo.

Ĉi tiu ideo donas al la Mesio-bildo de la Baptisto tiel malmildan kaj minacan trajton kaj al lia prediko karakteron pli de juĝaverto ol savanonco.

La bildo estas konkretigata per alegorio pri draŝejpurigo-bildo el la palestina kampara vivo. La Mesio estas kvazaŭ kampulo, kiu jam prenis la ventumilon por fari la lastan laboron, disigi la draŝitaĵon: ĵetante ĝin dum vespero, kiam la vento venas de la maro, en la aeron, tiel ke la vento blovas spikerojn kaj ŝeletojn en pli longan distancon, dum la grenoj falas apude. Ekestas du montetoj: la greno kaj la grenventumaĵo. La Mesio purigas sian draŝejon, t.e. Li komplete faras sian laboron: la tritikon Li kolektas en Sian grenejon, la ventumaĵon Li ĵetos en fajron, kiu per la epiteto "neestingebla" estas signita juĝofajro. La tritiko, do tiuj kiuj antaŭe konvertiĝas (al tio ja servas

la “pento-bapto” de Johano) kolektiĝos en la grenejo: ili estos baptataj per Sankta Spirito kaj eniros la Mesi-regnon. (La bapto per fajro do verŝajne ne estas alia bildo por spirit-bapto, sed temas pri du “baptoj”; tiu per fajro estos por la ne-konvertiĝantoj.⁽²⁾)

Ni atentu ankoraŭ la versojn 1:29-34 ĉe Jo, kie la Baptisto nomas Jesuon “Ŝafido de Dio, kiu forportas la pekon de la mondo”. Tiu esprimo ĝis nun ne estas kontentige ekzegezita, sed pri ĝi mi fakte ne volas paroli nun. Pli mi akcentu la ripeton de la vortoj pri la “pli potenca”. Ĉar en verso 30 la Baptisto ne lasas dubon, ke Jesuo estas en liaj okuloj la Mesio: “Li estas tiu, pri kiu mi diris: Post mi venas viro, kiu estas metita super mi ĉar li ekzistis pli frue ol mi.” Kion alian tio signifas, ol ke tiu pli potenca estas Mesio-Dio? Li ne diras, ke Li naskiĝis pli frue (efektive Jesuo ja naskiĝis pli poste), sed *ekzistis*. Laŭ kelkaj leg-manieroj, verso 34 diras: “ĉi tiu estas la Filo de Dio” (aliaj legmanieroj diras: “la Elektito de Dio”; sed ambaŭ esprimoj estas Mesio-titoloj). Antaŭe li ne konis Lin (verŝajne jes li konis Lin persone, ĉar ili ja estis parencoj; sed li ne sciis, ke Jesuo estas la Mesio), sed pro la descendo de la Sankta Spirito li ekkonis Lin, kaj li nun scias, ke Jesuo “estas la baptanto per la Sankta Spirito”. Do nun la Baptisto plenumis sian taskon, prepari la vojon al la Sinjoro, ĉar tiu ja venis. Kial li ne tuj aliĝas al Li adepto, sed daŭrigis bapti? Nu, ankoraŭ estas multaj, kiuj ne preparis sin al konvertiĝo, kiuj ne pentas ktp. Do li ne ĉesas voki kaj prediki kaj bapti, ĝis li troviĝas subite en karcero. Kaj krome: li atestas pri Jesuo kaj montras Lin al la homoj.

Ni demandis enkonduke, ĉu la agoj kaj paroloj de Jesuo kongruas kun la imago de la Baptisto. Ĝis nun ŝajnas ke jes, ĉar li ja ekkonis Lin per la unua publika “ago” de Jesuo: la baptiĝo kaj akcepto de la Sankta Spirito. Sed

kiel nun klarigi la mesaĝon de la Baptisto el la karcero Mt 11:3; Lk 7:19: “Ĉu vi estas la venonto, aŭ ĉu ni atendu alian?” Kiel li povas demandi tiel, se li jam ekkonis Lin kiel “venonton”?

Ni memoru, kion ni supre diris: Kiel ĉiuj profetoj, ankaŭ la Baptisto ne havis kompletan imagon, ne posedis totalan rivelon. Li atendis nur unu venon, nome tiun al mondjuĝo, de la Mesio. Nun tiu Jesuo jam dum kelka tempo vivis kaj agis publike, sed ankoraŭ ne komencis starigi sian regnon kaj aranĝi la finan juĝadon, kiun la Baptisto anoncis kaj senpacience atendas. Ĉu mirige, ke li ekdubis? Aŭ ĉu li travivis similan krizon kiel Jesuo sur Kalvario dum la nokto antaŭ Sia morto? Aŭ ĉu la Baptisto nur volis ke liaj adeptoj aŭdu el la buŝo de Jesuo mem, ke li estas la Mesio?

Tio ĉio povas ludi rolon, sed ŝajnas efektive, ke la Baptisto dubis, kion sugestas la respondo de Jesuo: “Feliĉa estas ĉiu, kiu ne falpuŝiĝas pro mi”, kvankam tuj poste Li laŭdas Johanon: “Inter naskitoj de virinoj ne aperis iu pli granda ol Johano, la Baptisto.” Ŝajne do tamen plej trafe oni klarigas la malfacilaĵon tiel, ke la Baptisto pro sia limigita scio pri la savplano de Dio hezitis kaj dubis. Kvankam la evangelioj nenion diras, ĉu la respondo de Jesuo (Mt 11:5-6) kontentigis la Baptiston, ni povas esti certaj, ke li komprenis tiun respondon, kiu atentigis lin pri la signoj akompanantaj la aperon de la Mesio.

La sorto de Johano estis sama kiel tiuj de ĉiuj profetoj: li ne plu vidis la realiĝon de la Mesio-regno, kiun li tiel fervore kaj fajre anoncis. Ĉu tragiko? En certa senco jes, nome se oni konsideras, ke, kvankam li estis la plej granda profeto, “tamen tiu, kiu estas nur malgranda en la regno de la ĉielo, estas pli granda ol li” (Mt 11:11). Aliflanke, ĉu li ne oferis sian tutan vivon al tiu, kiu estas la

nova vivo? Ĉu li ne havis grandiozan taskon, kaj plenumis ĝin kun ĉiuj konsekvencoj? Tial li meritas niajn plej sincerajn respekton kaj amon (la eklezio jam ekde sia frutempo honoras lin per propra festotago).

Restas ankoraŭ unu afero: Ĉu la Mesio-prediko de la Baptisto montras paralelojn al la Mesio-imago de la Esenoj (sekto de Qumran)? Estas ja multaj bibliistoj, kiuj volas pruvi, ke li apartenis al tiu komunumo. Nu, ĝuste en ĉi tiu konteksto klare montriĝas, ke li certe ne apartenis al ĝi — kvankam, tion mi koncedas, li verŝajne bone konis la Esenojn aŭ eĉ havis kontaktojn al ili.

La Esenoj atendis du Mesiojn (unu el Aaron kaj unu el Izrael), pri la Dia regno anoncita de Johano oni trovas preskaŭ nenion en la Qumranaj fragmentoj. La Baptisto direktis sin al la popolamasoj, dum la Esenoj instruis nur la proprajn sektanojn. Sed la ĉefa diferenco: la Esenoj ankoraŭ daŭre atendis la du Mesiojn, dum Johano atestis, ke en la persono de Jesuo venis la Mesio.

- 1) Ankaŭ (la greka) Mt ĉerpis el aliaj fontoj; antaŭ nia nuna Mk ekzistis negreka pra-Mk laŭ kelkaj bibliistoj; sed tio ne estas tre verŝajna. Certa tamen estas, ke Mk estas la plej malnova greka evangelio.
- 2) Erara certe estas la opinio, ke tiu “fajro-bapto” signifu la infer-fajron aŭ la purgatorion.

DEK DU TEORIOJ PRI LA ALTA KANTO DE SALOMONO

de George Rust

Iun matenon dum la paskaj ferioj de 1961, vekiĝinte mi malvigle rigardis la spinojn de miaj libroj; kaj venis en mian menson, ke mi neniam studis la libron *Alta Kanto*. Dum tiu tago mi legis en sep libroj kaj trovis ok teoriojn konkurajn. Posta legado montris pluajn kvar ne verŝajnajn; kaj, kvankam unu el la dek du plej logas min, mi proponos dek du teoriojn por via juĝo.

Titolo

La titolo hebrea *La Kanto de Kantoj* signifas ne (kiel Ibn Ezra kaj Kimĥi asertas) “kanto farita el la kantoj de Salomono;”¹ ankaŭ Fred ŝajnas same erari.

Ekzistas en la hebrea neniu superlativo, t. e. neniu adjektivo (nek adverbo) intensigita per “plej.” Tiun mankon oni plenigis per tri rimedoj. (a) per la prepozicio *min* — (proksimume) “el” : ekz. Levidoj 21 : 10, “la granda pastro el siaj fratoj” (*Z*)² — Trem. *maximus fratrum suorum* (la plej granda el siaj fratoj);³ simile Genezo 37:3, 3:1, Eliro 18:11, kaj eble Alta Kanto 5:10 “la plej granda el dek mil.” (b) per mencio de *Jahŭeh* (aŭ almenaŭ de *Jah*): ekz. Genezo 10:9 Nimrod “estis la plej potenca ĉasisto”; simile eble 6:11, 13:13; kaj eble Psalmo 118:5 (Vg. 117:5) laŭ juda traduko, “li respondis metante min en plej vastan liberecon” (laŭvorte “en vaston *Jah*”). (c) Per konstrua stato kaj pluralo, t. e. laŭ hind-eŭropaj terminoj, per plurala genitivo: ekz. Predikanto 1:2 “vantaĵo de vantaĵoj” — Trem. *vanitas vanissima* (plej vanta vantaĵo); simile Genezo 9:25 “la plej suba sklavo;” kaj Eliro 29:37 “la plejsanktaĵo” = Trem. *res sancta sanctorum* (la sanktaĵo de sanktaĵoj).

Ĉi tie do *La Kanto de Kantoj* signifas “La Plej Bona

Kanto” = france *La Cantique par excellence* = Luther *Das Hohelied Salomos* = B.⁴ *Alta Kanto de Salomono*.

La hebreaĵoj konjunkcioj ŝe kaj ’aŝer havas unu saman signifon: ili signifas proksimume “ke,” “kie,” “kiu,” relative, ne demande. En *Alta Kanto* oni uzas ĉie la formon “ŝe,” krom ĉe unu loko, nome 1:1 (Vg. uzas 1:1 por titolo), kie ni trovas ’aŝer: ekz. “kiu (estas) de Salomono” =3:7 ŝe li-Ŝlomoh, sed 1:1 ’aŝer li Ŝlomoh. Tio pensigas ke 1:1 estas ne parto de la teksto sed titolo simila je la titoloj super iuj Psalmoj. Psalmajn titolojn ni ne fidus, parte pro tio ke la *Talmud* kelkfoje malsamopiniis, kaj parte pro tio ke kelkaj laŭtitole Davidaj psalmoj ŝajnas multe postaj. Do ankaŭ la titolon de *Alta Kanto* ni ne devas fidi.

Dato

Se *Alta Kanto* estas verkita ne de Salomono, kial oni iam opiniis ke jes? En ĉ. 200 a. K. Sirah 47:17 (Vg. 47:18) atribuis al Salomono “odojn kaj sentencojn kaj parabolojn kaj komentariadon.” 1 Reĝoj 4:32 (hebrea teksto: 5:12) atribuas al li “mil kvin kantojn;” sed laŭ la LXX (3 Regnoj 4:28) “kvin mil kantojn;” kaj laŭ Josephus⁵ “mil kvin librojn da kantoj.” Antikvuloj do emis atribui al li senaŭtorajn verkojn: ekz. en iuj manuskriptoj ni havas kolekton de dek ok *Psalmoj de Salomono* greklingvaj, kaj iuj atribuis al li Psalmon 97: (Vg. 96) el la bibliaj *Psalmoj*; en 1908 oni trovis ankaŭ kolekton de kvardek du *Odoj de Salomono*; inter la disputataj libroj de la M. T. estas la *Saĝeco de Salomono*; kaj inter la ĉie kanonaj libroj, *Sentencoj kaj Predikanto*. Sankta Hippolytus skribas, ke reĝo Ĥizkija (latine: Ezechias) kaŝis la botanikajn verkojn de Salomono, ĉar legantoj sin turnus al ili por kuraci siajn malsanojn anstataŭ serĉi Dion. Do ni ne mirus, se iu estus trovinta pretekston atribui al Salomono ankaŭ la aŭtorecon de *Alfa Kanto*.

Kia preteksto? Ĉu, ke en *Alta Kanto* oni kvinfoje

mencias Salomonon? En ĉiuj kvin lokoj li aperas en la tria persono, t.e. “li,” ne “mi.”

Oni listas kelkajn vortojn en Alta Kanto kiuj ŝajnas esti hebrea; la LXX anstataŭigas ĉiun el ili per greka vorto suspektinde simila. En *Alta Kanto* 3:9 la vorto por “homportilo” (Fred kaj B: edziĝa lito) estas *’appirjon* (LXX *phorejon*), kio supozeble devenas de tiu greka vorto, se ne de la sanskrita *parjanka*; iuj judoj tamen devenigas ĝin de radiko hebrea. 4:13 “cipresoj” (F), “kofero” (B) estas *koper* (LXX *kuproj*), verŝajne de tiu greka vorto, se ne de la arama (= siria); 4:14 “safrano” estas *karkom* (LXX *krokos*), kaj eble devenas de la greka aŭ de la araba aŭ de la arama. 4:13 “paradizo” estas *parades* (LXX *paradejsos*), kiel ankaŭ ĉe Neĥemja 2:8 (B: “arbaro”) kaj Predikanto 2:5 (Z & B: “arbaretoj”); oni diras ke ĝi devenas de la antikva persa *phardajthi* (= modern-persa *firdaŭs*); sed povas esti ke ĝi devenas de la araba, aŭ de la greka, aŭ la malfrua asiria.

Aliaj vortoj ŝajnas esti aramaj, kaj eble montras ke *Alta Kanto* estas malfrua verko. Sed unuflanke ni posedas tiel malmultajn pecojn de frua arama, ke ni ne povas diri kiom ĝi similis la talmudan araman; kaj aliflanke, se *Alta Kanto* verkiĝis en norda Izraelo, la tiea hebrea eble laŭ kelkaj punktoj similis la araman.

En 6:4 (Vg. 6:3) oni ĝemeligas du urbojn: Jerusalemon kaj Tirca. Nu, Salomono reĝis proksimume 960-931 a.K. havante nur unu ĉefurbon, Jerusalemon. Tirca estis la ĉefurbo de la norda reĝlando proks. 930-879 (1 Reĝoj 14:17-16 :23). Do ŝajnas ke *Alta Kanto* verkiĝis tiom poste ke Tirca jam iĝis romantika kaj povis mistempigi en la reĝadon de Salomono.

Eble *Siraĥ* citas el *Alta Kanto*: ekz. *Siraĥ* 14:23 (Vg. 14:24) el 2:9; 26 :18 (26 :23) el 5:15; kaj 4:13-19 (24:17-26) el diversaj partoj. Se jes, *Alta Kanto* ŝajnas esti pli frua ol 200 A.K. Kaj la fremdaj vortoj ŝajnas malhelpi ĝin esti pli frua ol 300.

Sen-Di-eco

Pluraj versoj de A. K. estas ripetataj aliloke en A. K. dua kaj eĉ tria-foje. Se oni kalkulas la ripetojn kiel novajn versojn, la sumo estas 117. Kaj neniu verso mencias Dion.

Mi devas trakti ŝajnan escepton. A.K. 8:6 (se la teksto estas ĝuste legata) parolas pri “la flamo de *Jah*.” Sed tio (se ĝusta) estas nur la superlativo; vidu supere pri Nimrod. Trem. notas *Heb. flammae Jah, id est mazimae* (Hebree “flamo de *Jah*”, t.e. *plej granda*.) Kaj la angla traduko de 1611 diras *a most vehement flame* (plej intensa flamo).

En unu loko (aŭ du, se vi enkalkulas ripeton) A. K. ŝajnas intence eviti la nomon de Dio. Temas pri la verbo “ĵurligi.” La signifo de “ĵurligi” estas pezigi ordonon per dia nomo; ekz. 1 Reĝoj 22:16 “mi vin ĵurligas... en la nomo de Jahŭeh” (B: “...de la Eternulo”). Kiam oni devis ne uzi la nomon *Jahŭeh*, oni povis uzi ekz. la nomon el Psalmo 80 (Vg. 79) kaj aliloke: *’elohim cba’ot* = la dio de armeoj. Sed en A. K. 2:7 = 3:5, B: “Mi ĵurligas vin...je la gazeloj aŭ cervoj de la kampo” (Fred: “mi admonas vin...je la cervinoj aŭ je la antelopinoj de la kampo”), anstataŭ *’elohim cba’ot* estas sensignife *cb’ot...’ajlot*. Supozeble ĝi deziris aludi la dian nomon ne efektive menciante ĝin; tion ŝajnas opinii la LXX “ĵurligas vin...je la potencoj kaj fortoj de la kampo.”

Do A.K. ne nur ne mencias Dion, sed eĉ evitas nomi lin. Ne protestu ke en kanto pri amo mencias Dion oni ne volus; ĉar Psalmo 45 (Vg. 44) en 17 versoj nomas Dion trifoje, dum A.K. en 117 neniam.

Se A.K. (kiel ankaŭ *Ester*) nenie mencias Dion, tio nin pli mirigas, kial oni akceptis ĝin en la kanonon de la Biblio?

Kanoneco

La hebrea biblio havas tri partojn: la *Torah* (kutime, sed

ne precize, tradukata “la Leĝo”), la *Nebii*m (“la Profetoj”), kaj la *Ketubim* (“la Skribaĵoj”); kaj la partoj ricevis kanone-con laŭ tiu ordo. Pri la *Ketubim* oni ofte diras ke la Konsilantaro de Jabneh (= Jamnia) decidis en 90 p.K.; sed Meliton, episkopo de Sardes, listante la librojn laŭ judaj informoj eĉ ĉ. 180 p.K. ellasis la libron *Ester*.⁶ Ankaŭ pri A.K. disputado daŭris longe post 90 p.K. Por kompreni la jenajn citaĵojn, sciu ke leginte biblian libron pia Judo kutimis lavi la manojn antaŭ ol tuŝi nesanktajn objektojn.

Misna traktato “Jadaim” 3:5 —

Ĉiu libro de la Biblio malpurigas la manojn. *Alta Kanto* kaj *Predikanto* malpurigas la manojn.

Rabeno Jehuda (nask. 135 p.K., mortis 219) diras: “*Alta Kanto* malpurigas la manojn; sed pri *Predikanto* oni debatas.”

liabeno Jose diras: “*Predikanto* ne malpurigas la manojn; kaj pri *Alta Kanto* oni debatas.”

Rabeno Simeon diras: “*Predikanto* estas unu el la demandoj pri kiu la skolo de Ŝammaj prenis la pli mildan kaj la skolo de Hillel la pli severan regulon.”

Rabeno Simeon ben Azzaj (samtempa kun Aqiba) diris: “Mi aŭdis tradicion de la 72 plejaĝuloj, dum la tago kiam ili faris Rabenon Eleazar ben Azarja ĉefo de la kolegio, ke *Alta Kanto* kaj *Predikanto* ambaŭ malpurigas la manojn.”

Rabeno Aqiba (mortis 135 p.K.) diris: “Dio gardu nun! Neniu Izraelano iam argumentis pri *Alta Kanto* ke ĝi ne malpurigis la manojn; ĉar ĉiuj epokoj ne valoras la tagon kiam *Alta Kanto* estis donata al Izraelo. Ĉiuj *Ketubim* estas sanktaj; sed *Alta Kanto* estas la Sanktaĵo de la Sanktaĵoj.”

Traktado “Abot” de Rabeno Natan, ĉapitro 1:

Unue (oni diras) *Sentencoj*, *Alta Kanto*, kaj

Predikanto estis malpermesataj; ĉar pro tio ke oni konsideris ilin nur poeziaĵoj kaj ne partoj de la Ketubim, oni malpermesis ilin; ĝis venis la Viroj de la Granda Sinagogo kaj komentariis ilin.

Traktato Megilla 7a:

Rabeno Meir (ĉ. 160 p.K.) diris : “*Predikanto* ne malpurigas la manojn; kaj pri *Alta Kanto* oni debatas.”

Rabeno Jose diras: “*Alta Kanto* ne malpurigas la manojn, kaj pri *Predikanto* oni debatas.”

Tosepta Traktato Jadaim 2:14:

Alta Kanto malpurigas la manojn, ĉar ĝin diris la Sankta Spirito. *Predikanto* ne malpurigas la manojn, ĉar ĝi estas la saĝeco de Salomono.

Eĉ post tio (Origenes kaj Hieronymus informas nin), la judoj malpermesis al iu ankoraŭ ne 30-jara legi en *Alia Kanto*. Nenie oni citas el la *Alta Kanto* en ceteraj libroj de la Malnova Testamento, nek en la Nova Testamento, nek en Philono la Judo, nek en Josephus *Aniikvaĵoj*.

Eble la kaŭzoj kial *Alta Kanto* fine estis kanonigata estis kvar, laŭ jena sinsekvo: unue, ke ĝi traktis seksan amon, temon tiel allogan por multaj; due, ke oni supozis ke verkis ĝin Salomono; trie, pro la alegoria komentariado (kiun mi priskribos baldaŭ); kvare, pro la fervora favoro de Rabeno Aqiba.

Alegorioj

Mi konas dek du teoriojn pri la signifo de la *Alta Kanto*. La unuaj tri estas alegoriaj: en ĉiuj tri alegoriaj teorioj la amanto signifas Dion; kontraste, estas demandeble kiu estas la amata virino: en teorio 1-a, Dio amas Izraelon; en teorio 2-a, Kristo amas la Eklezion; kaj en teorio 3-a Kristo amas la unuopan

Kristanon.

Origenes verkis dek volumojn pri la *Alta Kanto* asertante la laŭvortan signifon (pri homa seksa amo), sed uzante ankaŭ teoriojn 2-an kaj 3-an. Teodoro el Mopsuestia (mortis 429 p.K.) rifuzis la alegorian interpreton, kaj insistis pri nur la laŭvorta signifo: Salomono (li diris) amis egiptan princinon, kaj devis en 1:5 (Vg. 1:4) advokati ŝin antaŭ la juda popolo; kaj nia redaktoro, S-ro Broadribb, antaŭnelonge montaris en la hebrea teksto punktojn kiuj klinas nin al tia teorio. Sed la Dua Koncilio de Konstantinoplo, 553 p.K., inter multaj kondamnoj pri Teodoro kaj Nestorio kondamnis ankaŭ ĉi tion. Samuel ibn Tibbon (mortis 1230) diras ke li mem opinias ke la *Alta Kanto* estas alegorio, kvankam lia patro instruis lin ke ĝi estas ampoemo. En 1544 Sebastianus Castellio (Sebastien Chateillon) advokatis la laŭvortan signifon dirante ke *Alta Kanto* estas “geistlich Buhllied” (anima svatkanto); kaj konsilis ke oni ne presu ĝin en la Biblio, kvankam li mem presigis ĝin en siaj tradukoj latina kaj franca. Kalvino eksigis lin el la estreco de la gimnazio kaj ekzilis lin el Ĝenevo. Grotius argumentis ke *Alta Kanto* estas nur babilado inter Salomono kaj la egipta princino; sed li uzis ĝin ankaŭ kiel “tipon” de la amo inter Kristo kaj la Eklezio.

1-a Teorio: Izraelo

Hoŝea 2:2, 19 (Heb. teksto: 2:4, 21) komparas la amon inter Dio kaj Izraelo kun geedza amo; simile verkas Jesaja 62:5, Jeremia 2:2, kaj Jeĥezkel 16; kaj laŭ la latina kaj siria tekstoj 2 (=4) Esdras 7:26 egaligas “fianĉinon” kun “la urbo.” Philono la Judo simile verkis. La Targum por *Alta Kanto* 1:8 (Vg. 1:7) parafrasas:

La belulino, t.e. la sinagoganaro, kiun mia animo amas, marŝu laŭ la paŝoj de la virtuloj kaj preĝu laŭ la ordonado de ŝiaj paŝtistoj kaj la gvidantoj de ŝiaj generacioj; kaj ŝi instruu al la kapridoj, t.e. al siaj filoj, viziti la sinagogon

kaj la lernejon.

Simile ni legas en la komentarioj *Rabbah*:

Eliro-Rabbah 49.1 pri A.K. 8:7: “Multaj akvoj (F. B, granda akvo) ne povas estingi la amon.” Se la idolismaj nacioj unuiĝus por detruji la amon inter Dio kaj Izraelo, ili ne kapablus.

Rabbah I 15.2 pri A.K. 1:15 (Vg. 1:14): “Viaj okuloj estas kolombecaj (F. B.: estas kiel ĉe kolomboj).” Kiel la kolombino ekkoninte sian parulon ne ŝanĝas lin, tiel la Izraelidoj de la tempo kiam ili ekkonis la Plejsanktulon lin neniam ŝanĝis.

Levidoj-Rabbah: Aĥare Moi 23.5 pri A.K. 2:2: “Kiel rozo inter la dornoj, tiel estas mia amantino (F, B.: amatino) inter la fraŭlinoj (F, B.: knabinoj).” Rabeno Ĥanina ben Rabeno Abba klarigis ke la dornoj estas la nacioj. Kiel norda vento blovante klinas la lilion suden, ĝis pikas ŝin la dornoj, sed ŝi tamen etendas sin supren, tiel la Izraelidoj afliktate per tributoj kaj servuto etendas tamen sian koron al sia ĉiela patro.

Rabbah VI 16.3. pri A. K. 5:16: “Lia palato estas dolĉaĵoj.” Rabeno Aha diris ke Rabeno Johano diris:

Kiam la Izraelidoj ĉe Sinaj aŭdis “Mi estas” (Eliro 20:2, kp. 3:14), ilia animo forflugis, kiel estas skribite (A.K. 5:6) “Mia animo sin tiris (F, B: animo tremis) dum li parolis.” Post tio la Parolo reiris al Dio dirante “Mastro de la mondo; ĉiam vi vivas; ĉiam vivas via *Torah*. Sed vi sendis min al mortintoj.” Post tio Dio por ili igis sian Parolon dolĉaĵo.... Li dorlotis ilin, ĝis reiris al ili iliaj animoj, kaj ili komencis preĝi....

La judaj *kohenoj* (t.e. pastroj) benante kutimis distiri siajn fingrojn po do —

Pesiqta Rabbati 72a, pri A. K. 2:9: “Mia amato... rigardante tra la fenestro, sin montrante ĉe la krado.” Tio estas Dio, kiu rigardas trans la ŝultroj de la pastroj kaj inter iliaj fingroj. Mia Amato al mi diras “La Eternulo vin benu kaj vin gardu....” (Nombroj 6:24-6). Ĉi tiuj specimenoj igas pli klara kial inter la judoj A. K. estis legata je la oka tago de Pesah (=Pasko). En la 13-a jarcento la filozofo *Rambam* (=Rabeno Moseo Majmunido) uzis la saman alegorion; same faris ankaŭ aliaj, ĝis, en niaj propraj tagoj, Ricciotti 1928 kaj la franca *Bible de Jerusalem* 1958.

2-a: La Eklezio

Ni konas en la Nova Testamento tri lokojn kie Kristo komparas sin al fianĉo: Marko 2:19-20, Mateo 25:10-11, kaj Mateo 22:2. Sankta Paŭlo uzas la saman analogion en Efesanoj 5:25; kaj Sankta Johano la Teologo en Apokalipso 21 :2.

Sankta Aŭgustino el Hippo skribas:⁷

En *Alta Kanto* la fianĉo parolante al la fianĉino (t.e. la Sinjoro Kristo al la Eklezio) diras (A.K. 2:2) “Kiel lilio inter dornoj, tiel mia proksimulo inter la filinoj.”

Simile skribas Sankta Hieronymus. Kaj Bonifaco VIII skribis en 1302⁸

Ekzistas nur unu sankta katolika Eklezio Apostola.... Ekster ŝi nek savo ekzistas nek liberigo el pekoj; ĉar en *Alta Kanto* 6:9 (Vg. 6:8) la Fianĉo proklamas “Unu estas mia kolombino, mia perfekta; unu ŝi estas el sia patrino, elektita de sia naskintino.” Tio signifas: unu korpo mistika, kies kapo estas Kristo.

La Tridenta Koncilio 1563 komparas la hierarkion al A.K. 6:4 (Vg. 6:3): “armeo envicigita.”⁹ Tremellius komencas sian komenton per:

Alta Kanto, kiun Salomono verkis Di-inspire, klarigas

la animan signifon de la edziĝo kiun Kristo establis kun la sur tero ekzistanta Eklezio.

La angla traduko (K.J.V.) de 1611 komencas sian komentaron per “La reciproka amo inter Kristo kaj lia Eklezio.” Hengstenberg (Luterano, ĉ. 1850) diras ke “ŝia umbiliko” (A.K. 7:2, Heb. 7:3) signifas la kalikon sur la altaro.

3-a: La Kristano

Sankta Bernardo el Clairvaux verkis 86 predikojn komencante de A.K. 1 :1. En sia 86-a prediko, ĉe kiu morto haltigis lin, li atingis ĝis A.K. 3:1:

“Sur mia kuŝejo, dum la nokto, mi serĉis tiun, kiun mia animo amas.” Honton por vi se vi rimarkas kion signifas la loko kaj la horo. Kio alia estas tiel amika al homa menso; kio tiel sekreta? Sekretecon havas kaj nokto kaj lito. Kaj preĝi volante ni havas ordonon (Mateo 6:6) eniri ĉambreton por sekreteco.

Sed li trovas diversajn signifojn, kaj uzas la punktojn kiel “tipojn.” Sankta Johano de la Kruco en sia poemo *Kantoj inter la animo kaj la fianĉo* memoras ĉie la alegorian uzon de A.K.; mi tradukos por vi ok strofojn, kiuj — nur hazarde — preskaŭ ĉiuj estas el la partoj kie parolas la fianĉino:

1. (Ŝi:) Amat', vi kien fuĝis
Lasante min pri vi ĝemanta ^ave!?"
Vi kvazaŭ cerv' rifuĝis.

Vundit', mi serĉis ne
Trovante, dum mi kriis por vi. "He!"

(Kp. A.K. 2:9, k.a.)

13. (Ŝi:) Ne vidu min, Amato.
Forflugas mi.

(Li:) Vin turnu, kolombin'.
La cerv' post via bato
Surmonte flaras vin,

Per via flugventet' freŝigas sin.

(Kp. A.K. 6:5, 1:15, 2:8-9, ka.)

16. (Ŝi:) Jam floru nia lito;
 Leonoj kaŝas sin ĉirkaŭe for.
 En purpuraj' medito,
 Dum vi en paca hor'
 Kroniĝas per mil ŝildoj el la or'

(Kp. A.K. 1:16, 4:8, 4:4)

18. (Ŝi:) Mi trinkis en la kelo
 Sekreta de l' Amat'; kaj elirinte
 Sur tuta kampnivele
 Nenion jam koninte
 La brutojn perdis min-sekvintajn tinte.

(Kp. A.K. 2:4, 1:7-8)

26. (Ŝi:) La vinberplant' jam floras.
 Do kuru for de ni vulpinoj ĉiuj
 (Dum ni bukedon gloras
 Per belaj rozoj tiuj),
 Ĝis sur la mont' aperos jam neniuj.

Kp. (A.K. 2:15)

27. (Ŝi:) Mort-norda vent', foriru.
 Kaj venu, sud', kun niaj am-memoroj:
 Ĝarden' en mia spiru,
 Ke blovu la odoroj,
 Kaj la Amat' paŝtiĝu sur la floroj.

(Kp. A.K. 4:16, 6:2-3, 2:16)

32. (Ŝi:) Judujaj junulinoj,
 Odoras dolĉe ambre belakorde
 La rozoj kaj kuminoj.
 Do restu eksterporde:
 Ne penu paŝi sur la sojl' misorde.

(Kp. A.K. 2:7, k.a.)

37. (Ŝi:) En altajn do grimpinte
Kavernojn rokajn ĝuos ni la poston;
Nin kaŝos montopinte;
Kaj tie trinkos toston
Ni gustumante la granatan moston.

(Kp. A.K. 8:2)

John Bunyon estis Baptisto, kaj mortis en 1688. En sia *Grace Abounding* li skribas (par. 90):

Se la savita animo tentate kaj forlasite estas la Amatino de Kristo, tiam, ho kompatinda tentata animo, kiam vin atakos kaj afliktos tentoj, kaj kiam la Dia vizaĝo estos kaŝita, tamen pensu ankoraŭ pri tiuj du vortoj, “mia amatino” (A. K. 4:1).

Charles Wesley, inter siaj 5500 himnoj, ofte aludas al A. K. Jen unu strofo, en kiu li evidente memoras pri A.K. 1:7:

Izraela Paŝtisto kaj mia,
Mi ĝojas pro vi; vin deziras.
Mia amo al vi estu plia.
Kie vi, mi loĝadi sopiras.
Mi (ve!) la paŝtejon ne trovas,
Kie paŝtas vi ĉiujn ĉe-bruste
Obeajn ŝafidojn, kaj kovas
Ombratajn tagmeze aŭguste.

4.-a: La Di-Patrino

Post tio ni pasas al kvar teorioj kiujn favoras nur mal-multaj aŭ eĉ nur unu. Kelkaj komentarias pri *Alta Kanto*, ke temas pri Sankta Mario. Sankta Tomo Akvinano en unu artikolo malpruvas la senpekan naskiĝon de Sankta Mario; kaj en sia tuj posta artikolo li pruvas ke ŝi neniam faris pekojn age:¹⁰

La benita Virgulino neniam age faris pekon nek

mortigan nek pardoneblan) tiel, ke en ŝi estas plenumita la diro (A.K. 4:7, F:) “Via tutaĵo estas bela, mia amantino (B: amatino); vi ne havas difekton.”

5-a: Saĝeco

Kiel Saĝo 8:2 personigas Saĝecon kvazaŭ amatinon, Rossenmueller (Luterano, mortis en 1835) klarigas la tuton de A.K. kiel la amon inter Salomono kaj Saĝeco. La siria Peŝita-traduko eĉ nomas la libron A.K. “la Saĝeco de Salomono.”

6-a kaj 7-a: Politikaj

Luther instruis ke A.K. estas dialogo inter Salomono kaj lia popolo. Hug (Romkatoliko, mortis en 1846) diris ke A. K. estas verkita kiam la dek triboj sopiris rekuniĝi, dum la epoko de reĝo Ĥizkija.

8-a: Tammuz kaj Iŝtar

En 2 Reĝoj 21:7 ni legas ke la malvirta reĝo Manase adoris interalie Iŝtaron; Jeremia severe malordonis tian adoron al la “reĝino de la ĉielo” (Jeremia 7:18, 44:17-18), kaj Jeĥezkel (18:14) abomenis la lamentadon pri Tammuz. Povas esti ke temas pri tio ankaŭ ĉe Juĝistoj 11:40, 21:19-23. Erbt en 1906, Meek en 1926, kaj kelkaj aliaj opinias ke temas pri tio en A.K., ĉar oni trovis kojnliteran tekston kiu eble estas himno al Tammuz. Tiu opinio ankaŭ povas citi por si la nomon de Margoliouth (1928). Laŭ kelkaj, do, la Amatino en A. K. estas kulta prostituitino, kaj reprezentas la diinon Iŝtar: nur diaĵo (ili pledas) povus tiel vojaĝi inter montoj, kiel en A. K. 4:6, 8; kaj la lito en 3:10 havas emajlan bildon pri Amoro, kaj similas la liton de Venus en Theokritos xv 128. Sed en 1930 Rowley ŝajnis detruiri ĉi tiun teorion.

9-a: La Draŝtabulo

Por draŝi grenon la antikvaj judoj kutimis sterni ĝin sur roka

draŝejo (ekz. 1 Kronikoj 21:18) aŭ kelkfoje en vinpremejo (Juĝistoj 6:11). Kelkloke oni tie batadis ĝin per vergo (Jesaja 28:27); sed pli ofte bovo trenis sur ĝi draŝtabulon (Readmono 25:4, 1 Samuel 24:22), similforman je unuhoma glitveturilo kun ŝtonoj sube fiksitaj por apartigi la grenon disde la ŝeletoj (Jesaja 41:15, Amos 1:3). Por plipezigi la draŝtabulon la draŝanto sur ĝi staris. Post la draŝo oni per ligna forko (Luko 3:17, Mateo 3:12 “ventumilo”), aŭ per ŝovelilo kaj forko (Jesaja 30:24) levigis ambaŭ en la aeron, por ke la vespera vento (Rut 3:2) forblovu la ŝeletojn (Daniel 2:35), dum la, pli peza, greno vertikale falas. La nunaj araboj de Palestino faras sian draŝtabulon el peco da onda lado, unue sensulkiginte ĝin per bula ŝtono, kaj post tio per akra ŝtono frapinte truojn tiel ke feraj dentoj malsupren sin etendas. Apud Samario mi vidis du bovojn treni knabon, kaj du azenojn treni viron; kaj aliloke mi vidis du virinojn kaj knabinon; la araboj siajn draŝbestojn buŝumas.

En 1873 Wetzstein, prusuja konsulo en Damasko, publikigis artikolon pri la edziĝaj festoj de la modernaj araboj tie. La festo daŭras (li raportas) sep tagojn. Je la unua tago la fianĉino dancas svingante glavon; kaj tiunokte la paro kune kuŝas. Je la dua mateno iuj el la kunuloj montras ilian sangmakulan littukon por pruvi ke antaŭ tiu nokto ŝi estis virga. Post tio ili sur la draŝejo ornamas la draŝtabulon (germane: Dreschtafel) per tapetoj kaj kusenoj, kaj sidigas sur ĝin la paron kvazaŭ gereĝojn aklamante. Ĉiumatene dum tiu semajno unu kunulo, la “ĉefministro,” vekas sian “reĝon”; kaj refoje oni surtronigas la paron. Oni kantas specialajn kantojn nomatajn *ŭasf* poezie listigantajn la belaĵojn de li aŭ de ŝi; aŭ oni kantas kantojn pri bataloj aŭ amaferoj.

En 1894 Budde proponis ke A.K. estas kompilo el ŭasfoj.

Nu vere estas ke la sanghava littuko aperas en la M. T.; ne tamen por festo sed por tre serioza proceso. (Readmono 22: 13-21), post kiu aŭ la edzo ricevos vipadon (Josephus diras ke

de 39 batoj¹¹) aŭ la edzinon oni ŝtonmortigos. Kaj vere estas ke en A.K. ni legas ŭasfecajn katalogojn ĉe 5:10-16 pri viro, kaj pri virino ĉe 4:1-5 kaj 7:1-9 (Heb. 7:2-10); kaj ŝercemulo aldonus ke klare estas ke la fianĉino estas juda, ĉar en 7:4 (5) oni komparas ŝian nazon al turo! Sed restas kvin kialoj por ne samopinii kun Budde. (1) Kvankam en A. K. oni vidas Salomonon, kaj nomas la fianĉinon en 7:1(2) "nobelidino," neniuj traktas la paron kvazaŭ gereĝojn. (2) Neniuj mencias draŝtabulon, nek draŝejon. (3) Neniuj mencias littukon. (4) Neniuj mencias edziĝon (krom en 3:11, ni aŭdas ke Salomono jam antaŭe edziĝis, kio ne estas por ni nova informo!); kaj neniuj, kiel jes en Psalmo 45:16 mencias naskojn.

(5) Sed la plej grava malpruvo estas la malsameco de jarcento kaj religio. Kie en la M.T. ni legas pri la ceremonioj de la draŝtabulo? Ni legas pri la edziĝo de Isaak kaj Rebeka (Genezo 24), sed ne ke iu per ŭasfo katalogis por li ŝiajn ĉarmojn. Kiam Raĥel edziniĝis je Jakob, ŝi sidis ne sur unuhoma glitveturilo sed sur la familaj idolo (31:34). Pri la seksvivo de Ŝimŝon ni aŭdas multon (en ekz. Juĝistoj 14:2, 16:1, 4); sed neniuj montras pruvon pri la virgeco de iu amatino, eble pro sufiĉa kialo. Pri la amafero inter Boaz kaj Rut ni aŭdas pli da detaloj ol ni Eŭropanoj preferus (ekz. Rut 3:7); sed neniuj nomas ilin gereĝoj. Saul edzinigis sian filinon Mihal je David; sed dancado ŝajnis ne placi ŝin (2 Samuel 6 :16). Kaj, kiam Tobias edziĝis je Sara (Tobit 7) ni ne legas ke ŝi ŝvingis glavon.

10-a: Kolekto

En 1778 Herder proponis ke A. K. estas kolekto da ampoemoj, malgranda antologio; la opinio logis la poeton Goethe kaj plurajn eruditojn ĝis Weiser, 1948. *Psalmoj* estas kolekto, sed tie estas plej ofte (kvankam ne ĉiam) evidente kie ĉesas unu psalmo kaj komenciĝas alia. La unuaj ĉapitroj de Jesaja (mi ne parolas pri plura aŭtoreco) estas kolekto kies eroj eĉ aperas laŭ malĝusta ordo. Sed en A.K. la unueca stilo kaj

oftaj ripetoj eble argumentas unu aŭtoron.

Tiu teorio pri kolekto, se vera, estus iom ĝena, ĉar ĝi povus esti kuna kun ĉiu alia teorio: povus esti, ekz., ke A. K. estas kolekto da kantoj alegoriaj; aŭ ke ĝi estas kolekto da kantoj pri Tammuz; aŭ ke ĝi estas kolekto da ŭasfoj; aŭ kolekto da dramoj. Sed tiu ĝeno ne estas argumento.

Dramo aŭ Balado?

Jes, pluraj proponis ke A.K. estas dramo; sed mi ne listigis tion inter miaj dek du teorioj, ĉar ĝi estas nur varia formo de teorioj 11-a kaj 12-a.

Oni povas kelkloke distingi la sekson de la parolanto per anatomiaj punktoj, ekz. A.K. 4:5 kaj 7:3 (Heb. 7:4) estas ambaŭ diritaj pri virino, do supozeble de viro.

En la hebrea verbo ne nur la tria persono montras sekson, sed ankaŭ la dua persono, kaj tio helpas al ni identigi la alparolaton. Komparinte la identigojn de du verkintojn (la ĵus mortinta T. H. Robinson, kaj nia propra redaktoro) mi trovas por A.K. la jenan disjuĝon laŭ la hebrea:

1:2-4	ino	parolas al viro
1:5-6	ino	viroj
1:7	ino	viro
1:8-11	viro	ino
1:12-14	ino	viro
1:15a	viro?	ino
1:15b-17	ino	viro

(La Vulgato, uzante 1:1 kiel titolon, numeras ĉiun version malpli per unu).

Sed en la LXX du manuskriptoj, nome S. kaj A., ruĝinke aldonas detalojn jene:

1:2	SA	La fianĉino: Ho, li kisu...
1:3	A	La fianĉo: Tial la fraŭlinoj...

- 1:4a S La fianĉino al la junulinoj rakontas pri la fianĉo liajn favorojn: La reĝo...
- 1:4b S Al la fianĉino rakontinta la junulinoj respondis: Ho, ni ĝojos...
- 1:4c S La junulinoj krias al la fianĉo la nomon de la fianĉino: (F): Boneguloj amas vin (= B "Sincere oni amas vin")
- 1:5 SA La fianĉino: Mi estas nigra...
- 1:7 S Al la fianĉo K (risto?): Diru al mi...
- 1:8 S La fianĉo al la fianĉino: Se vi ne...
- 1:10 S La junulinoj al la fianĉino: Belaj estas...
- 1:12 A La fianĉo: Mia nardo...
- 1:12 S La fianĉino al si kaj al la fianĉo: Mia nardo...
- 1:15 S La fianĉo al la fianĉino: Ho, vi estas bela...
- 1:16 S La fianĉino al la fianĉo: Ho, vi estas bela...
- 1:16 A La fianĉino: Ho, vi estas bela...

Vi vidas ke ĉi tiuj notoj konfliktas kaj inter si kaj kontraŭ la hebrea. La armena Biblio havas eĉ pli da notoj. Ernest Renan supozis dek rolulojn.

Sed ke *A.K.* estas laŭ ordinara signifo dramo, tion malpruvas la duboj mem kaj la manko de indikoj pri parolantoj.

Ekzistas tamen alia speco de verko, la folkloro balado. Tio estas ia epopeeto iam kantita, kvankam nun oni konas la ariojn de malmultaj. Ili temas pri bataloj, pri religio, pri maresploro, pri ŝercoj, pri magio, kaj (jes) pri amaferoj. Multaj baladoj ne klare rakontas sian historieton, ĉar ĝi samtempe estis tiel bone konata ke aludoj sufiĉis. Multaj uzas kaj rakontadon kaj dialogon; kelkaj nur dialogon; sed en dialogo ili plej ofte kantas nur la vortojn parolatajn sen "li diris" aŭ "Ŝi respondis" Laŭ tio, ili iom similas dramon; kaj kelkfoje mi aranĝis ke infanoj aktoru baladon.

11-a Du Dialogantoj

Delitzsch, 1851, kaj post li aliaj diris ke en *A. K.* Salomono svatas fianĉinon sub la ŝajnigo kvazaŭ du gepaŝtistoj; t. e., la vira paŝtisto estas nur rolo de la reĝo. Nu, vere estas ke en la greka poeto Theokritos kaj en la latina Virgilius kaj en aliaj ni vidas la modon verki poemojn (kaj precipe priamajn) pri paŝtistoj imagataj kaj eĉ fantaziaj; vere estas, ke eŭropaj poetoj de la 17-a kaj 18-a jarcentoj tre frandis tiun modon, kiel ankaŭ la porcelanistoj de Dresden; kaj vere estas ke la franca reĝo Louis la 14-a enuante pro la zorgoj de regado kaj la lukso de Versailles ĝuis kelkfoje ferii kvazaŭ kamparano, kondiĉe (kompreneble) ke li ne devas vere labori aŭ sian veston malordigi. Sed ĉu Salomono tian ludon ĝuus? Lia propra patro pri ŝafoj laboris kaj ilin defendis kontraŭ urso kaj leono! Krom tio, la Amatino en *A. K.* ne ŝatas riĉon (8:7-b), kaj 8:6 pensigas ke ŝi atendas edzinecon unuedzinan.

12-a: Tri Dialogantoj

Fine ni atingas la solvon kiu plej logas min (kvankam tio ne pruvas ĝin ĝusta): ke la Amatino havas du amantojn, nome la reĝon kaj iun paŝtiston. Wachter 1722, kaj Jacobi, 1771, unuaj (laŭ mia scio) proponis ĉi tiun solvon; post Ewald, 1826, multaj eruditoj aprobis ĝin; kaj en 1946 la saman solvon uzis Rabeno D-ro S. M. Lehrman.

Ekzistas iom simila araba rakonto raportita de tiu sama Wetzstein, 1868. Ĥamda amis Habbason, ano de malproksima gento; kaj ŝi amis Ĥamdan. Sed ŝia patro edzinigos ŝin je kuzo Ali. Je la tago de la geedziĝo, ŝi konfidis al sia kuzino (fratino de Ali) kiom ŝi amas Ĥamdan kaj ke ŝi povus rekoni lin en granda amaso, per lia beleco. Lastmomente venis Ĥamda kun sia amiko Ĥusejn, kaptis ŝin, kaj kondukis al sia hejmo.

Komentariantoj kiuj opinias ke *A. K.* estas rakonto simila

al tiu araba, ne samopinias pri detaloj. Laŭ ĉiu ajn teorio A. K. ne estas klara, rekta, facile komprenebla: se jes, kial la konfliktaj teorioj en ĉi tiu artikolo priskribitaj? Krom tio rimarku alian punkton: kiel Psalmo 114:2 uzas la pronomon *lia* ne menciante kies, tiel ankaŭ A.K. 1:2 (laŭ ordinaraĵ tradukoj) uzas *li* ne menciante kiu. Nu, se A.K. estas tia rakonto, eble konturo estas jena:

La patro de la knabino estas kredeble mortinta; ĉar ŝiaj fratoj ordonasŝin: ili diras A.K. 8:8-9, “Nia fratino estas tro juna por edziniĝo. Se ŝi gardos sian virgecon, ni iam donos por ŝi doton; sed se ŝi allasos amantojn, ni ŝin enŝlosos.” Ŝi respondas, 8:10 “Mi jes gardis mian virgecon. Sed mi estas pli matura ol vi opinias; kaj mi jam estas amata.” Timante pri eventuala amanto malriĉa, la fratoj transsendis ŝin, 1:6, de la fora ŝafaro por labori anstataŭe en la apudurba vinber-ĝardeno; kaj ŝi iom hontas tie pro sia sunbrunigita haŭto. La transsendo estas tro malfrua: ŝi jam ekamis junan paŝtiston, 1:7, kiun tamen estante ĉasta ŝi vizitis tagmeze kaj ne nokte. Li vizitas ŝin eĉ en la urbeto, 2:8-9. Ŝi sopiras lin, 3:1, eliras en la stratojn por vidi lin, 3:2, kaj demandas pri li la policon, 3:3. Sed jen proksimiĝante en sia portlito inter gvardio venas la reĝo Salomono, 3:6-7, kiu ekamante deziras aldoni ŝin al sia jam konsiderinda kolekto da edzinoj, 6:8; kaj en 4 li arde svatas. Kredeble li forkondukas ŝin; ĉar, 5:1, li fanfaronas (tro frue) pri ŝia kaptiĝo. Tiunokte (aŭ ĉu ĝi estas nursonĝo?) sonĝo?), 5:2, dum ŝi enlitiĝas, 5:3, li alvenas: li etendas sian manon tra la truo en la pordo, 5:4; kaj ŝi konas ĝin. Sed, kiam ŝi revestis ŝin kaj eliras, li jam malaperis, 5:5-6; kaj la polico batas ŝin, 5:7, konante nur unu specon de virino kiu promenas nokte. Refoje en la palaco, 5:8, la kunedzinoj demandas ŝin pri ŝia amato, 5:9; kaj ŝi ne malvolonte respondas, 5:10-16. Ili montras intereson, 6:1; sed ŝi rifuzas ilian helpon, 6:2-3. Salomono timas ŝin, 6:4-7; amas ŝin pli ol siajn ceterajn, kaj timas perdi ŝin, 6:13-7:9 (Heb. 7:1-10). Ŝi planas forkuri, 7:10-11, kaj sukcesas, 8:5. Kaj en 8:11-12, ni havas la ŝlosilon de la tuta balado: ŝi diras “Salomono estas milionulo; kaj liaj

ĝardenistoj enspezas po ducent. Tion mi ne domaĝas al li: mi havas mian paŝtiston.”

Balado

Tiu fino memorigas iun komentariiston pri la franca kanto:

Se al mi ĉefurbon donus
La Reĝo de Paris,
Kondiĉe, ke sen amatino
Rezignaci mi,
Mi dirus al la reĝ' Louis
“Parizon rericovu,
Mi amas karulinon pli,
La karulinon pli.”

Sed tra mia cerbo sonoris alia ario kiun miaj anglaj legantoj konas. Mi transskribas laŭ la plej konata teksto, imitante ĝian neperfektan rimaron kaj ĝian malregulan ritmon. Interpunkcion mi enmetas, sed ne la citilojn, por ke vi mem divinu kie oni parolas kaj kiu :

Tri ciganoj ĉe kastela pord'
Malalte, alte, kantis nun.
Sidis la lordin' dum horoj kvin.
Degelis ŝia koro kvazaŭ prujn'.

Ili kantis dolĉe, akre, ĝis
Fluadis larmoj kvazaŭ dron'.
La ringon el or' ŝi metis for,
La silkan robon kun galon'.

La ŝuojn el Hispana led'
Altkalkanumajn detrenis ŝi:
En straton, sed kun nud-nuda pied',
En vent' kaj veter' ŝi iris post la tri.

La ĉevaleton selu tuj,
 Kaj la ĉevalon de lakt-kolor'
 Mi rajdu ĝin post mia nov-edzin'
 Kiu iras kun la Ĉifonar-Ciganoj for.

Li rajdis tien kaj tien ĉi;
 Arbaroj ne haltigis lin,
 Ĝis venis li al vasta kamp';
 Kaj tie aperis lia nobelin'

Ĉu foriras vi de bien' kaj dom'
 De via mon' kaj or-trezor'?'
 Ĉu foriras de ĵus edzigita lord'
 Por iri kun la Ĉifonar-Ciganoj for?

Ĉu min interesas bien' aŭ dom'?'
 Ĉu min interesas or-trezor'?'
 Ĉu interesas mia nova lord' ?
 Mi iras kun la Ĉifonar-Ciganoj for.

Lastnokte vi dormis sur plummatrac'
 Kun tuka faldo laŭ sinjor'.
 Sed nun vi dormos en vasta venta kamp'
 Kun bando da Ĉifonar-Ciganoj for.

Ĉu min interesas plummatrac'
 Kun tuka faldo laŭ sinjor'?' Ĉar nun mi
 dormos en vasta venta kamp'
 Kun bando da Ĉifonar-Ciganoj for.

Rimarku ses similojn inter tiu balado kaj A. K.: (1) la folkloran naivecon de la stilo. (2) La ripetoj, kiaj popularan kantanton plaĉas. (3) Ke ĝi balanciĝas inter rakonto kaj dramo, havante iom da rakontado kaj iom da dialogo. (4) En la rakontaj partoj ĝi ne klare raportas, sed, pli ĝuste, aludas fidente ke la aŭdantoj jam antaŭe scias pri la afero almenaŭ la

konturon. (5) En la dialogaj partoj ĝi ne diras kiu parolas. (6) La temo. Ĉar, kvankam mi ne enmetis citilojn, vi povas diveni kiu parolas kaj ke la faktoj estas jenaj: iu ciganino ĵus edziniĝis je lordo kiu posedas kastelon; sed kiam ŝiaj kunciganoj vokas, ŝi senvestas sin je liaj donacoj kaj eliras kun ili. Li serĉas, kaj petas ŝin reveni. Sed ŝi rifuzas preferante... preferante kion? Ĉu ciganecon vivon? Aŭ ĉu atendas iu cigana junulo?

Ĉu Iom da Historio?

Kiam mi tion atingis, tiklis mian memoron la demando “ĉu mi ne aŭdis ie aserton ke tiu pricigana rakonto havas iom da vereco? Ke ĝi iam okazis? La kantlibro el kiu mi tradukis,¹² diras nur “folkloro.” Porinfana antologio¹³ diras ke la kanto venis el la provinco Somerset, verŝajne pro tio ke Cecil Sharpe (la folkloristo) laboris precipe en Somerset kaj donis al multaj dancoj kaj kantoj vaste konataj tiun provincon adreson; noto tamen donis parton de malsama teksto dirante ke oni trovas la kanton ankaŭ en Skotlando. Antologio¹⁴ de baladoj precipe de la limregiono inter Anglujo kaj Skotlando donas la novan tekston tutan, kie la lordo estas Grafo Cassilis kaj la grafino jam amis junan ciganon nomatan Johnny Faa. Robert Burns, la famkonata skota poeto mortinta en 1796, kompilis notojn pri skotaj kantoj kaj baladoj¹⁵; tie li donas eĉ alian tekston kun noto “La kastelo ankoraŭ ekzistas ĉe Maybole, kie lia Lorda Moŝto enŝlosis sian malobeeman edzinon kaj tenis ŝin dum sia vivo.” Plurajn kastelojn oni konstruis apud Maybole; sed supozeble ne temas pri tiu kie dum la milito loĝis Generalo Eisenhower. Oni kreis la grafecon de Cassilis en 1509; do kredeble la okazaĵo ne povas esti pli antikva. Tia tradicio nomas Jean Kennedy, 1607-1642, kiel la ciganan grafino; sed tio ne povas esti, ĉar ni scias ke Jean Kennedy naskiĝis filino de la Grafo de Haddington. Tre povas esti ke la balado ne ĝuste raportas la aferon; ekzemple, ĉu la grafino reiris al sia ciganaro, aŭ restis mallibera en la kastelo?

Ĉu ankaŭ A. K. havas eron da historio — eble (simile) ne tute ĝustan? La sola punkto kiu povus helpi estas ke en 6:13 la Amatino ricevas nomon: oni nomas sin la Ŝulamit (la LXX Codex Vaticanus ortografias la nomon Sumanejtis.) Kelkaj opinias ke la nomo estas nur ina formo de Salomono, kvazaŭ Salomonino; sed oni supozus ke tia nomo estus Ŝlomit.

Verŝajne do Ŝulamit signifas “La virino el Ŝulam;” sed kie troviĝas Ŝulam? Kaj Eusebius kaj Hieronymus (kies lingvoj ne posedis la literon ŝ) diras ke Sulem = Sunem. Nu urbon Sunem ni konas ĉe 1 Samuel 28:4 (LXX Soman) kaj Josuo 19:18 (LXX Sunan aŭ Sunam); la nuna Ŝolam ŝajnas esti la loko. Du ŝunemaninojn ni konas en la M.T.

Unu estas la patrino de la knabo al kiu Eliŝa redonis vivon (2 Reĝoj 4:34-36). Sed ŝi ŝajnas ne taŭga; ekzemple, en 4:8 ŝi estas riĉa.

La alia estas Abiŝag (LXX Abejsa aŭ Abisag; Josephus: Abisake¹⁶).

En 1 Reĝoj 1:1-3, la reĝo David en sia profunda aĝo estis malvarma en sia lito. Do por liveri al li kvazaŭ homan varmakvo-botelon, oni organizis belulinecan konkurson en kiu la venkantino estis Abiŝag. Ŝi do kuŝis en la lito kun la reĝo; sed li, 1:4, “ne konis ŝin,” t. e. ne havis seksan kuniĝon. Ŝi estis ankoraŭ en la lito kun li, kiam en 1:15 li diris al la reĝino sian lastan ordonon por certigi al la juna Salomono la reĝecon. En 2:17, por pretendi la reĝecon anstataŭ Salomono, Adonija petis la kromvirinon Abiŝag kiel edzinon; sed en 2:22 Salomono, komprenante lian motivon, rifuzis. Tio estas la lasta mencio pri Abiŝag: ni ne legas eĉ ke ŝi estis la patrino de iu filo de Salomono.

La reĝo “ne konis” ŝin supozeble pro sia granda aĝo; kaj Josephus eĉ diras ke ŝi restis virga pro sia maljuneco. Sed populara sentimentaleco facile konjektus ke pro amo al iu alia,

prefere juna, verŝajne jam konata, kaj nepre malpli riĉa. Kaj se tradicio erare konfuzis Salomono kun lia patro — ĉu ĝi ne eraris ankaŭ pri Jean Kennedy?



NOTOJ

1. Plejparte mi citas el *Alta Kanto* laŭ la eldono de J. H. Fred (en Edinburgo). Ĝin mi citas ne pro tio ke mi taksas ĝin pli bona ol aliaj, sed pro tio ke malmultaj konas ĝin.

2. Z = la Zamenhofaj tradukoj el la M.T., eldonitaj de Hachette.

3. *Trem.* = Tremellius, judo konvertita al kristanismo (kalvina); li iĝis profesoro pri la M.T. en la Universitato de Heidelberg, en 1561; li tradukis la Bibliion latinan.

4. Bs: = Biblio eldonita de Brita kaj Alilanda Biblia Societo, 1926.

5. Flavius Josephus, *Antikvaĵoj de la Judoj* VIII 2.5 (= VIII 44, Niese).

6. Eusebius: *Historio Eklezia* IV 26. 14.

7. *De Fide Rerum Quae Non Videantur* 8. 11.

8. Denzinger 468.

9. Kunsido 23a, ĉapitro 4 = Denzinger 960.

10. S.T. 3a q27 a4 ad1.

11. Josephus: *Antikvaĵoj*, IV 8.23 = IV 248.

12. *Fellowship Song Book*, 100.

13. Walter de la Mare: *Come Hither*, 83.

14. *Oxford Book of Ballads*, 148.

15. *Remarks on Scottish Songs and Ballads*.

16. Josephus: *Antikvaĵoj*, VII 14.3 = VII 344, kaj VIII 1.2 = VIII 5.

*Kelkaj Libroj elektitaj
el multaj pri tiu temo*

- Jules Michelet: *La Bible de l' Humanité* (1864) parto ii, ĉap. 6.
- Karl Budde (1898) en la *Kurzer Hand-Commentar: Die Fuenf Megilloth*.
- J. W. Rothstein (1902) en *Hastings Dictionany of the Bible* vol. iv, paĝoj 589-597.
- A. Harper (1902) en la serio *Cambridge Bible for Colleges and Schools*.
- G. Currie Martin: *Proverbs, Ecclesiastes, and Song of Songs* (1908) paĝoj 285-358, en la serio *The Century Bible*.
- P. Jouon: *Le Cantique des Cantiques* (1909).
- S. R. Driver: *An Introduction to the Literature of the Old Testament* (1913) paĝoj 436-453.
- T. J. Meek en *The American Journal of Semitic Languages and Literature* xxxix (1922) paĝoj 1-14.
- M. Haller (1940) en la *Handbuch zum Alten Testament*.
- Rabeno S. M. Lehrman: *The Song of Songs* (1946) en la Volumo *The Five Megilloth* en la serio *Soncino* kontrolita de D-ro A. Cohen.
- A. Robert: *Le Cantique des Cantiques* (1958) en la serio *La Bible de Jerusalem*.
- D. R. Broadribb: en *Ahr-Nahrain* iii (1961) paĝoj 11-36.

* * *

MODERNAJ METODOJ POR LA INSTRUADO DE SEMIDAJ LINGVOJ

de A. Capell

Tempora mutantur: la tempoj ŝanĝiĝas, kaj kun ili la instruatoj. La estanta jarcento vidis revolucion en la lingvo-lernigado, samtempe kun la vastigo de lingvistiko kiel scienco. Ĉi tiu revolucio inkluzivas ĉiujn lingvojn sur ĉiu kontinento, esceptante la klasikajn lingvojn, latinan kaj grekan, kune kun la semidaj lingvoj. La instruado de la latina kaj greka lingvoj laŭ la novaj metodoj en la Perse Lernejo en Cambridge fariĝis mondfama, sed malfeliĉige ĝi forlasiĝis antaŭ nun. Nur la instruistoj de la semidaj lingvoj ŝajnas resti netuŝeblaj de la nova movado. Ili restas kontentaj pri la klasikaj gramatikoj, kelkaj bone provitaj kaj bonegaj kiel gramatikoj laŭ la klasika tradicio, sed ekstreme lamentindaj kiel lingvoinstruiloj por lingvoj tre malsimilaj al la hindeŭropaj je strukturo kaj uzado. Malmultaj studentoj lernas la hebrean lingvon; kelkaj eklezioj ne plu postulas ke kandidatoj por la pastreco eĉ studu la hebrean — ĉefe ĉar tiom el ili trovis la taskon senkuraĝiga kaj la laboron senproportia al la rekompenco. Unu amiko de la nuna skribanto, homo lingve mallerta sed dotita per vasta persisto, diris ke post kiam li tralaboris persisteme al la diplomo B. D.¹ “Mi memoras nur unu vorton hebrean, *’ohel*,” kaj li pensis pri ĝia sono kiel angla vorto, ne pri ĝia signifo.²

Dum miaj studenttagoj en Aŭstralio la norma instrulibro pri hebrea lingvo — por mencii nur tiun lingvon, ĉar ĝi estas la plej studata el la semidaj lingvoj — estis la *Hebrew Grammar* de A.B. Davidson, kaj, se oni progresis sufiĉe, lia *Hebrew Syntax*. La unua eldono de la gramatiko aperis en 1874; nuntempe ekzistas 25a eldono reviziita, kaj ĝi estas ankoraŭ instrulibro. Certege, tiu estas nur unu el multaj, sed efektive ĉiuj estas sammetodaj. La *Teach Yourself Hebrew* (“Instruu al vi mem la hebrean lingvon”) de 1955 sekvas ankoraŭ la samajn principojn, kvazaŭ la lingvistiko, aŭ teoria aŭ aplikita, ne ekzistus. Normaj verkoj, kiel Gesenius-Kautzsch,³ estas bonegaj kiel

referencverkoj, kaj tiaj libroj estas necesegaj, sed ili ne estas lernolibroj por komencantoj, kaj la semidisto neniam rimarkis la diferencon inter lingvoinstruado je elementa nivelo kaj klera studado je la plej altaj niveloj.

Ĉi tiuj libroj, kaj aliaj similaj, kaj la respondaj verkoj pri aliaj semidaj lingvoj — Wright kaj Thateher pri araba, Brockelmann pri siria — estas ĉiuj aranĝitaj samprincipe. La lernanto komencas lernante fremdan skribon; li lernas la regulojn por kunmeti signojn, por skribi vokalojn (ellasotajn, almenaŭ en la araba), li lernas prononcon kiu por mortaj lingvoj devas esti nur teoria redono, kaj por viva lingvo alproksimiĝo, krom se li havas instruiston neordinare bone kapablan. Poste li iras, se temas pri la hebrea lingvo, al lerno de kompleksa aro da reguloj por ŝanĝi vokalojn kaj aliigi la punktadon — morfofonemajn regulojn, laŭ la terminaro de la nuntempa lingvisto — sen praktika apliko de ili samtempe en sia laboro. Poste, se li venkas la komencajn barilojn, kiuj estas preskaŭ kiel eble plej senkuraĝigaj, li komencos studadi artikolojn, substantivojn, ve-bojn kaj aliajn kategoriojn laŭ aranĝo konjekteble logika, unu post alia. Kiajn ajn frazojn li povus kunmeti, aŭ kiajn ajn elparolaĵojn li povus fari, li trovas tute apudaj. Li lernados vortlistojn, kaj la plimulto de la ekzerclibroj enhavas multe tro da novaj vortoj por ĉiu ekzerco aŭ leciono. Li kunmetos tiujn ĉi vortojn por fari frazojn progrese pli kompleksajn kun pseŭdobiblia enhavo, ĝis li povos rigardi almenaŭ kelkajn “facilajn partojn” de la Malnova Testamento. Oni sekvas esence la saman procedon por aliaj semidaj lingvoj, kondukantan al la studado de la klasikaj teksto] en la koncerna lingvo.

-II-

Kion diros pri ĉi tio la instruisto de modernaj lingvoj kiu estas moderne edukita pri lingvistiko? Kiaj estas liaj plendoj? Ankaŭ pli grave, kian helpon li povos prezenti?

Baze li kontraŭparolas la tutan sistemon faritan laŭ la

klasika modelo kiu enhavas la literaturon kiel celon. “La lingvoj estas malsamaj” estas krio de moderna lingvistiko. Ne estas eble lernigi du lingvojn per la sama metodo sendiference. Samtempe, ne ekzistas kialo por lernigi lingvojn per gramatikaj kategorioj. Oni ne kredas nuntempe ke estas konvene aŭ eĉ eble lerni fremdan lingvon tiel, kiel infano lernas nasklingvon, sed estas ĉiam eble lerni laŭ la plej utilaj metodoj, tiel ke oni povus uzi tion kion oni lernas. Kompreneble, scienca metodo ne devas esti nesistema metodo; kaj la lingvisto ne emus forĵeti la malnovajn metodojn pure por ŝanĝo. Sed tial ke la lingvo estas sistemo, kaj ĉiu lingvo diferencas strukture de ĉiu alia, li insistas ke oni studu ĉiun lingvon laŭ ĝia speco, kun karaktero propra al ĝi mem, tiel ke ne estas eble studi la semidajn lingvojn sammaniere kiel la hindeŭropajn, ĉar ilia strukturo estas radikale malsama. La problemoj kiuj ekaperas rilate al la tempsistemo de la semidaj lingvoj, ekzemple, ekaperis pure pro tio ke la baza ideo de ĉi tiuj verbformoj estas malsama en la du lingvofamilioj. Se oni traktus ĉiun kiel fenomenon de la propra naturo (*sui generis*), la malfacilecoj kaj la argumentadoj pri la tempoj de la hebrea verbo ne levigis. Estas la peno akordigi du neakordoblajn sistemojn kiu starigas la malfacilecojn por la studanto. “La lingvoj” pure “estas malsamaj.” La lingvisto kredas ke ne estas eble lernigi laŭ moderna metodo ian ajn lingvon sen plena kaj ekzakta priskribo laŭ ĝia propra strukturo, tiel kiel ĝiaj parolantoj ĝin komprenas kaj pensas pri ĝi, kaj tute ignorante ian alian lingvon, kiel ajn honorindan aŭ klasikan. Kompreneble, li povos diri plie ke la metodoj uzataj por lernigi la klasikajn lingvojn, latinan kaj grekan, estas eraraj, kaj tion li ja diras, kvankam liaj plendoj staras sur aliaj bazoj.

Nu, rilate al la semidaj lingvoj, oni ankoraŭ ne havas ian strukturan studon kiu povus esti uzata kiel bazo de lernigo. Ekzistas ja kelkaj komparativaj gramatikoj, sed tiuj ĉi ankaŭ sekvas la klasikan modelon, kaj tial ni eniras rondon. Antaŭ ne longe unu verkisto pri lingvistiko kaj edukado diris pri

strukturaj studoj, “Ĉi tiu postulaĵo estas nepre ankoraŭ ne plenumita, eĉ — oni povas almenaŭ diri, super ĉio — rilate al la lingvoj de alta kulturo. La sarkasmaĵo ne estas sen vero, kiu diras ke lingvoj kiel la mazateka (en Centra Ameriko) estas pli bone priskribitaj ol kelkaj gravaj eŭropaj lingvoj.”

Alia argumento de la lingvisto kontraŭ la malnovaj metodoj de lingvoinstruado estas ilia emfazo je la skribita kaj pure literaturaj formoj de la lingvoj. Li diras, “La lingvo estas parolata, ne skribita,” kaj tiu opinio venas al la kutima instruisto kiel sentofendo. Laŭ la klasika tradicio de la latina kaj greka lingvoj, la plena valoro de la studado sin trovas en la libroj, en la skribita vorto. Tio ĉi okazas eĉ en la lernigado de vivaj lingvoj. Mi memoras instruiston de franca lingvo kiu ne permesis al siaj lernantoj paroli francajn vortojn; ili ĉiam devis alfabetumi la vortojn. Kiam mi transprenis klason de li, ili ne povis diri unu vorton, kaj ne volis toleri mian paroladon de vortoj! Tio, konfesate, estas malofta rilate al vivaj lingvoj, sed ne tiel malofta pri mortaj lingvoj. En tiuj ci lingvoj ĉefe temas studi literaturon; sed oni devas memori ke literaturo estas sole lingvoprodukto, ne lingvo kiel vivantaĵo. Certe, rilate al mortaj lingvoj semidaj ankaŭ, tiu studado de skribitaj literaturoj estas la celo de la studanto, sed, unue, ne ĉiuj semidaj lingvoj estas mortaj, kaj, due, ne estas pruvite ke gramatika metodo estas la plej bona maniero doni mastrecon de lingvo. La unua fonto de lingvo ne estas libro kun siaj normoj, sed tio, kion diras indiĝenaj parolantoj de la lingvo. Ĉio alia estas flanka afero.

Tial la moderna lingvisto ekiras de tri principoj: 1. Lingvo antaŭ skribo; 2. Lingvo antaŭ gramatiko; 3. Literaturo kiel celo, ne kiel ilo. Ĉiuj tiuj principoj estas preterpasataj en la klasikaj metodoj de lingvoinstruado. Kiel jam dirite, la lernanto komencas per studado de skribo, li studadas gramatikon por kiu la ekzercoj estas nur praktikado. Li sekvas deduktan metodon: la moderna lingvisto sekvas metodon induktan aŭ heŭristan el ekzemploj kiuj ilustras principojn. Post kiam li

sufiĉe ekzercadis la gramatikajn principojn kiujn li lernis de la ekzemploj, li povos legi literaturon sen malfacileco. Samtempe tamen estas bone ke kiel eble plej multe la ekzemploj estu tir-itaj el la literaturo mem. Okaze de la hebrea aŭ araba lingvo, neniam estas tro frue por legi eltiraĵojn el la literaturoj. Fakte, laŭ la metodo de Prendergast (en lia “majstreco”-serio) li komencas la hebrean studadon per frazo el la Biblio kaj ne uzadas alian materialon, sed nur la Biblion, por la tuta kurso. Tiu ĉi metodo estos traktata pli vaste malsupre. Kontraŭ atendo, ĝi ne malhelpas aŭ superruzas la necesan studadon de la gramatiko.

Oni rimarkos la supre menciitan frazon “lingvo antaŭ skribo” kiel unuan principon de moderna lingvoinstruado. Tio ĉi prezentos malfacilojn al la klasika instruado. La lernanto de la greka lingvo kutime komencas per la studado de la alfabeto, ĝis li ekscias ĉiujn literojn; la studanto de la hebrea aŭ alia semida lingvo agas sammaniere. Sed tiu ĉi kutimo estas io artefarita, heredaĵo el civilizacio bazita sur skribita lingvo, kun literatura tradicio. En la natura mondo, kio okazas? Oni unue lernas paroli, nur poste skribi, — kaj en orientaj landoj, speciale antikve, multaj neniam lernis skribi, kvankam ĉiuj lernis paroli. La infano komencas studi en lernejo post kiam li jam scias paroli sian propran lingvon; en la lernejo li lernas skribi ĝin. Unue la parolado, poste la skribado. Kial ne simile je la lernado de nova lingvo? La respondo de multaj instruistoj estos ke tia procedo evidentigos la problemon de prononcado, kaj oni ne scias la prononcon de la malnova hebrea. Tio estas vera, kaj estos necese rigardi ĝin malsupre; sed la argumento ne apiikeblas al lingvoj ankoraŭ nuntempe uzataj, kiel la araba. Certe, ne estas necese ke la studanto de la araba unue sciu la skribon antaŭ ol li alprenos silabon de la ĉiutaga lingvo! La kutimaj arabaj gramatikoj, sen escepto, komencas per konigo de la malfacila skribmetodo de la lingvo. La sola escepto kiun konas la verkanto estas nova rusa verko, *Naĉalnyj Kurs Arabskogo Jazijka* (“Komenca kurso de araba

lingvo”) de Segal, Moskvo, 1962. Tiu ĉi libro ja uzas de la komenco la araban alfabeton, sed enirigas la literojn unu post alia, farante vortojn kiujn oni povas uzi en frazoj, ekz. en la unua leciono, ' *d*, *r*, kaj *z*, kune kun la vokaloj *a*, *i*, kaj *u*. En la dua oni lernas *dh*, *ŭ* (*u*), longan *a*, kune kun la signo *tanŭin*, kaj uzas la vortojn *ŭizrun* (ŝargo), *dārun* (konstruaĵo), *zādun* (provizaĵo), *ŭirdun* (trogo), *ŭardun* (rozo), *ŭāridun* (alvenante). Post tio, oni ekkonas la aliajn literojn paŝon post paŝo, kune kun frazoj iom post iom kompleksigantaj. Lingvo kaj skribo marŝas kune, kiel la lingva scio de la infano rilate al ĝia nasklingvo. Tio ĉi ŝajnas bonega kompromiso por tiuj, kiuj ne volas uzi parolan aŭ fonetikan lingvo-metodon. La nuna skribanto mem komencis grekan lingvo-kurson laŭ fonetika skribo antaŭ multaj jaroj, kaj trovis ke la lernantoj estis helpataj de tia metodo.

Tial estas tute eble ke la novan lingvon oni unue lernu per fonetika skribmetodo, kaj ne laŭ la kutima ortografio. Simile estas eble komenci la studadon sen formala gramatiko — la dua principo de la moderna lingvistiko. La infano ne lernas sian nasklingvon pere de gramatiko. Li lernas per aŭskultado de aliaj parolantoj. Malgraŭ ĉio, ne temas, rilate al lingvo, pri la reguloj de gramatiklibro, sed tio, kion diras la popolo kies estas la lingvo. La lingvo estas aĵo viva kaj ŝanĝiĝema, kiu ne estas limigebla per Akademio aŭ artefarita regulsistemo. Kiam oni penas agi tiamaniere, la parolata lingvo senĉese elŝiriĝas el la limoj, kaj sekvas sian vojiran linion. Diras do la moderna lingvisto: komencu de la popola lingvo, poste oni povas lerni laŭ la teorioj kaj la gramatiklibroj, tiom kiom oni volas! Oni memoru ankaŭ la diraĵon, “La vortaro estas pleje utila al tiu kiu povas plejmulte preterlasi ĝin.” Unue la viva lingvo, poste la formalaj reguloj!

Por montri ke la instruistoj de klasikaj lingvoj ne estas tute apartaj de modernaj progresoj, mi citas kelkajn vortojn de W. Sweet el lia enkonduko en la latinan lingvon, *Latin: A*

Structural Approach: “ĝenerale minimumigu kiel eble plej multe paroladon pri la lingvo. La studantoj lernos latinon ĝin aŭdante, parolante, legante kaj skribante, ne parolante *pri* ĝi. Kiel eble plej multe, evitu la specon de parolado pri la lingvo kiun oni nomas “traduko.” Se la studanto povos respondi latine al la demandoj, li scios la signifon de la materialo.” Tial, la kurso estas konstruita ĉirkaŭ 360 bazaj frazoj “kiuj ne pure ilustras ĉiujn aferojn de la strukturo, sed utilas kiel bazo por la modelaj praktikaĵoj kiuj laŭvice donas masan praktikadon pri ĉi tiuj punktoj.”

Estas tial grave ekscii la strukturon de la nasklingvo kiel fakton, ne pure pasivan asimilaĵon, ĉar la modeloj de la nasklingvo povas multe enmiksiĝi en tiujn de la lernata lingvo. Kaj pri multaj lingvoj tia struktura gramatiko ne ekzistas. Unu skribinto pri la angla lingvo diras, ekz., “kompleta ĝenerativa, trinivela gramatiko de la angla lingvo ne ekzistas,” kaj ĉi tio estas vera diraĵo. Estas vere ankaŭ des pli pri klasikaj kaj semidaj lingvoj. Oni bezonas tion kion oni nomas “transiga gramatiko” (angle, “transfer grammar”) kiu kontrastos la frazmodelojn de la semida lingvo kun tiuj de la nasklingvo de la lernanto. Ekzistas tia gramatiko pri la germana kaj rusa lingvoj (vidu la bibliografion). La termino “transiga gramatiko” eble bezonas klarigon. Chavarria-Aguilar priskribas ĝin tiel en sia *Lectures in Linguistics* (Poona, 1954; ĉap. VI): “La transiga gramatiko estas kolekto de teknikaĵoj por lernigi lingvon. Esence ĝi estas struktura komparo de du lingvoj kiu prezentas la strukturajn principojn de la lernota lingvo kontraŭmetitajn al tiuj de la lernanto. La celo estas ebligi ke la lernanto regu kiel eble plej precize la strukturon fonologian, morfologian, kaj sintaksan de la dua lingvo. Tial la transiga gramatiko konsideras unue la ilojn kiujn jam posedas la lernanto, t.e. lian nasklingvon, kiel plimalpli difinitan sistemon kun modeloj de morfologio kaj sintakso, kaj volas preni tiujn ĉi ilojn por la necesaj pliaj faktoj pri sonoj kaj form-modeloj kiuj donos al la lernanto regpovon

super la strukturaj trajtoj de la nova lingvo.”

Tial la transiga gramatiko necesigas ke la instruisto plene komprenu la strukturon de ambaŭ lingvoj — sia kaj la lingvo kiun li instruas. Oni sendube diros ke tiu ĉi estas ĉiam fakto efektiva. Se mi parolas angle, mi komprenas jam la anglan strukturon. Sed estas tute klare ke la fakto ke mi parolas la lingvon ne certigas ke mi komprenas la metodojn de ĝia agado. Kiom da angloj vere komprenas la metodojn de agado de sia lingvo? Tiu scio estas nekonscia (se oni povas akcepti la kontraŭdiron de la vortoj!) se ĝi ne fariĝas io konscie studata. Multa “angla gramatiko” estas superstiĉo pli ol scienco.

Oni ne povus diri ke la klasikaj kaj la semidaj lingvoj estas specialaj ekzemploj — esceptoj pri kiuj modernigado de instrumentado ne estus necesa, ĉar laŭ la vidpunkto de la lingvisto, precize pro tio ke “la lingvoj estas malsamaj,” ne povas ekzisti tia speciala escepto aŭ ekzemplo. Ĉiuokaze bezonas ĉiu lingvo specialan traktadon pri si.

Kio rezultos se ĉi tiu speciala traktado okazos? Unue, pli granda intereso, tiel ke la observo de la studanto pri *ohel* ne okazos! Oni parolas tiel nur kiam oni tediĝas, kaj tedita studanto neniam sukcese lernas lingvon — aŭ ian ajn alian temon! Multaj modernaj libroj kaj libretoj preparitaj por judaj junuloj (pri kiuj estos, malsupre, plia mencio) klarege montras ke estas eble aranĝi instrulibrojn nature interesajn, kiuj samtempe provizas firman bazon por kompreno de la gramatika strukturo kaj por granda vortaro. Oni sendube respondos, ke la lernantoj de la hebrea lingvo, esceptante la judajn junulojn, estas preskaŭ sen escepto adoltoj, plenkreskaj personoj, kiuj jam estas multe kaj profunde studintaj, kaj kiuj tial ne perdas intereson pro malfacilaĵoj. Tio ja estas vera, sed kial malfaciligi studadon sen neceso? Multaj studintoj laŭ ordinara nivelo sendube estus fariĝintaj studintoj laŭ alta nivelo, se ili havus pli klaran, interesan kaj vivan

enkondukon en siajn studaĵojn. La intereso estas la bazo de ĉiu vera edukado, kiu neniam devas fariĝi servutlaboro.

Restas ankoraŭ alia punkto jam menciita: ne estas eble supozi studadon sukcesa se la lerninto devas esplori la tekston per vortaro kaj gramatiklibro. La lerninto de moderna lingvo povas legadi sen tedo, kaj kompreni sen libro-esploro la literaturon de la elektita lingvo: ĉu ne devas esti same pri la studado de la semidaj lingvoj? Sed nuntempe, aparte de malplimulto de elstaraj klasikuloj, kiom da lernintoj de semidaj lingvoj — aŭ klasikaj — povas agadi tiamaniere? Kiom da kleruloj aŭ pastroj povas kontinuiĝi siajn lingvostudojn dum la posta vivo? Eĉ kiom da estontaj pastroj kredas ke estas necese kalkuli la hebrean lingvon inter siaj studaĵoj? Estas necese trovi metodon kiu pligrandigos la komprenon de tio, kion oni studadas dum la kolegia kaj seminaria vivtempoj. Rilate aliajn semidajn lingvojn ol la hebrea, la situacio estas pli malbona: kiom da tiuj, kiuj komencis la studon de la hebrea, eĉ interesiĝas pri la studo de la arama aŭ siria, kiuj ambaŭ apartenas al progresiva biblia studado?

Tial ĉio estas grava, kio povas grandigi la intereson de la potenciala studanto, por pliprofundigi ties scion de la lingva ilo lernata:

-III-

La supra parolado pri ĝenerala lingvostudado sufiĉas. Nun, oni pensu pri la aplikado de ĉi tiuj ĝeneralaj principoj al la speciala studado de semidaj lingvoj, por vidi tion kio jam estas plenumita kaj tion kio restas plenumota. Sub ĉi tiu rubriko necesas fari komparon inter la metodoj de la klasĉambro de modernaj lingvoj kaj tiuj de la semida klasĉambro. Oni tial komencu per konsidero de la klasĉambro de la franca, aŭ alia moderna lingvo: kion oni trovas tie!

Kvankam dum la fruaj tagoj de la revizianta movado,

ekzistis tendenco forĵeti instrulibrojn, tiu tendenco ne daŭris. Hodiaŭ oni trovas instrulibrojn eĉ en la malsupraj klasoj, sed ĉi tiuj libroj ne regas la instruadon; ili restas nur gvidlibroj kaj spertlibroj. La unua afero kiun la noveveninto rimarkas en la klasĉambro estas la prefero donata al la parolata lingvo kaj la zorgo donata al korekta prononcado. La lernantoj parolas antaŭ ol ili skribas, kaj la instruisto insistas ke ilia prononco estu kiel eble plej korekta. Eble li komencas per komparo inter la sonsistemo de la nasklingvo kaj tiu de la nova. Ĉiuj akordos ke tia procedo estas necesega pri moderna lingvo, kiun la lernanto eble devos uzi aŭ uzadi poste; inter la semidaj lingvoj ne estas disputeble ke tia agmaniero devas esti sekvata pri la araba, amhara aŭ moderna siria lingvoj. Ne ĉiuj tamen akordos ke estas egale necese pri lingvoj kiel la akada aŭ la biblia hebrea. Estas eble defendi tiun ĉi pozicion, sed restas vere ke se la lernanto scipovas prononcon plej verŝajnan kaj konjektprobablan okaze de lingvo ne pluparolata, li komprenos pli facile sonŝanĝojn kaj la fenomenojn morfofonemajn kiujn li trovos en ĉiu ajn lingvo. Speciale valoras tiu ĉi fakto okaze de la hebrea lingvo, kies sonŝanĝoj en la korpoj de vortoj estas kompleksaj kaj restas ĉiam sur bazo de fonetikaj faktoj. Malsupre oni diros pli pri la prononcado de la hebrea; sufiĉas nun rimarki ke la afero estas pli grava ol iuj supozas.

Alian okazaĵon ankaŭ rimarkos la vizitanto al la klasĉambro tuj kiam li ekzamenos la instrulibrojn. Tio estas la elekto de la vortaro. En la modernaj libroj tio ne estas hazarda afero. La vortoj ne okazas laŭ la arbitro de la skribanto, kiu pensas ke tio ĉi aŭ io alia estus bona frazo tradukenda aŭ legenda! Kiom da fojoj oni rimarkas, ke, kvankam vortareto estas donita super la leciono, la verkinto enkondukis aliajn vortojn kiujn li metis inter krampojn, ĉar li ĵus pensis pri bona frazo kiun li devas enŝovi, sed kiu bezonas vortojn kiujn li ne donis! La vortoj en la modernaj instrulibroj okazas laŭ difinita principo de uzado. La plej uzataj vortoj aperas antaŭ

la malplej uzataj. Tio estas la principo de kalkulado de vortfrekvenco. La fundamenta vortaro de lingvo povas esti kalkulata, tiel ke la plej uzataj vortoj fariĝas konataj antaŭ la pli raraj. Oni jam faris tiajn kalkulojn pri la modernaj lingvoj ĝenerale lernigataj en la lernejo. Pri kelkaj semidaj lingvoj ekzistas ankaŭ tiaj vortkalkullistoj — ekzemple Moŝe Brill, “La Baza Vortlisto de la Araba Ĵurnalaro” (eldonita angle, arabe kaj hebree samtempe en unu volumo, de la Hebrea Universitato, Jerusalemo, 1940). Menciindaj ankaŭ estas Reimer-Friedemann Edel, *Hebräisch-Deutsche Vokabellern- und Repetitionshefte* (Hebrea-germana ekzerclibroj por vortlerno kaj praktiko), 2 malgrandaj libroj, eldonitaj en 1958; kaj angle eĉ tre malnova listo en la *Introductory Hebrew Method and Manual* (Enkonduka Hebrea Metodo kaj Manlibro) kiun oni diskutos malsupre, eldonita de William R. Harper unue en la jaro 1885, kaj represita en 1958. Tiu ĉi verko enhavas listojn de vortoj okazantaj 500 ĝis 5000 fojojn, kaj malpli, ĝis tiuj kiuj okazas 50 ĝis 100 fojojn en la Biblio. Tiuj ĉi listoj estas reeldonitaj en 1959 de J.D.W. Watts kiel aparta presaĵo.⁴ Simila libro pri la kopta lingvo (la kopta lingvo de la Nova Testamento) aperis en 1961, eldonita de Brill por B. M. Metziger. Ankoraŭ ne aperis similaj verkoj pri la siria aŭ arama lingvo. La saĝa instruisto bazos sian instruadon sur tiaj elektoj de vortoj, kie ajn ili estas haveblaj. Ne estas okazo ĉi tie diskuti la principojn laŭ kiuj oni preparas tiajn vortlistojn, sed ilia uzado estas fundamenta por la moderna lingvoinstruado.

Havante tiel legolibrojn preparitajn laŭ la metodoj de vortkalkulado, la lernanto povos komenci konektitan legadon kiel eble plej baldaŭ. La leciono dividiĝas en sekciojn pri prononcado, kune kun praktikado de jam lernitaj materialoj, praktikado de novaj materialoj kaj legado, kun voĉaj ekzercoj bazitaj sur la legaĵoj. Unu esperanta lernolibro kiu estas bazita sur tiuj ĉi metodoj — kaj sen nacilingva traduko — estas la *Privilegia Vojo* de Vilho Setälä (Helsinki, 1960). Tiu

ĉi libreto sekvas la plej modernajn metodojn, kaj esperante parolantaj instruistoj de semidaj lingvoj povus utile ekzameni ĝin rilate metodon. Unu grava trajto de tiu ĉi libreto, jam menciita, estas la manko de alilingva teksto kaj ekzercoj de traduko, ĉar la novaj metodoj utiligas nur ŝpareme tradukojn el la nasklingvo al la fremda kaj reciproke. Ili utiligas prefere temojn kaj ne tradukadon, ĉar pli valoras la povo legi kaj diskuti realaĵojn ol nekunligitajn frazojn, el kiuj multaj ankaŭ multfoje estas sensignifaj — ni nur bezonas rigardi kelkajn malnovajn instrulibrojn. Mi havas gramatiklibron de novgvinea lingvo, en kiu okazas la frazo “Kion li ne diras?” — elokventa silento! Eble la silento de homo tro alarmita por paroli!

Eble la instruisto montros al la vizitanto ankaŭ alian ĉambron — lingvolaboratorion. Tie ĉi li vidos kelkajn ĉambrojn, ekipitajn per mikrofono, magnetofono, kaj skribtableto. Per la magnetofono la studanto aŭskultas lecionojn en la lingvo donita, kiujn li jam estas studinta en la klasĉambro aŭ parole aŭ skribe aŭ ambaŭ, kaj li povos paroli en la mikrofono respondojn al demandoj, kaj buŝajn ekzercojn, kiujn poste la instruisto laŭvice prenos kaj aŭskultos, por ke li povu korekti la prononcadon kaj la frazstrukturon de la studanto. La lingvolaboratorio formas parton de ĉiu moderna universitata lingvodepartemento, kaj eĉ de kelkaj kolegioj, sed ĝis nun ĝi ne ŝajnas trovi uzadon ĉe semida lingvoinstruado. Certege ĝi estus pli ol utila por araba lingvistudado; kaj eĉ por aliaj semidaj lingvoj, parolataj aŭ ne plu parolataj, ĝi povus helpi kaj la studenton kaj la instruiston. Por plimodernigi la lernigadon de tiuj ĉi lingvoj, estus konsilinde ke la instruistoj de ĉi tiu fako serioze pensu pri ellaboro de lingvolaboratoriaj metodoj.

Se tiaj scenoj aperas en la modernlingva klasĉambro, kion oni devas vidi en la klasĉambro de semidaj lingvoj? Kompreneble ne estas eble determini unu solan procedon; la

instruistoj kaj la lernantoj diferencas — simile al la lingvoj. Sed estas eble fari unu simplan dikotomion — inter vivaj kaj mortaj semidaj lingvoj. Necesas, tial, unue diskuti la lernigadon de vivaj lingvoj, kaj inter ili, la araba lingvo, la plej kutime parolata lingvo.

Inter la lerniloj pri la moderna araba, jam estas menciita la verko de Segal por rusaj lernantoj. Tiu ĉi libro estas kompromiso inter nova kaj malnova metodoj. Ĝi lernigas la alfabeton iom post iom, formante vortojn laŭ la literoj jam konitaj. Alia libro de Scott sekvas similan agmanieron. Samtempe ĝi rigardigas la prononcon kaj enhavas ekzercojn por distingi literojn kaj sonojn konfuzebajn. Samtempe ĝi prezentas la gramatikon, ree per simpligita metodo. La ekzemploj uzas vokalumitan tekston, la ekzercoj nevokalumitajn, kaj kiam li atingos la finon, la lernanto havos bonan vortaron, scipovon de la plej uzataj gramatikaj formoj, kaj fundamenton de sento pri moderna literatura stilo — kio estas ja tiom, kiom oni povas postuli de libro kun tia amplekso. En tiu ĉi libro la aŭtoro penas fari la plej grandan utilon el ambaŭ mondoj, la malnova kaj la nova, kaj grandmezure li sukcesas, eĉ se estas nur libro por komencantoj. Almenaŭ la fundamentoj estas bonege kaj vere metitaj.

Ankaŭ inter libroj de miksita metodo, sed pli proksima al la malnova ol tiu de Segel, oni devas mencii la *Introduction to Modern Literary Arabic* (Enkonduko al la Moderna Literatura Araba Lingvo) de David Cowan, eldonitan en Cambridge, Anglujo, en 1958. Generale, ĝia metodo ne estas moderna, sed enhavas du karakterizaĵojn kiuj valoras mension tiurilate. Dum estas vere ke ĝi komenciĝas per studo de la tuta alfabeto, ĝi sekvas sistemon de transliterumado ĝis la deka leciono. La aŭtoro diras en sia antaŭparolo ke “ĉi tiu estas ilo kiun oni devas forlasi kiel eble plej baldaŭ.” Li diras ankaŭ ke “ĉiuj ekzercoj kaj ekzemploj devas esti reskribataj sen la vokalpunktoj, por ke la studanto kutimiĝu legi araban

sen la vokaloj, kiel ĝi kutimas aperi presite.” La dua menciendaĵo estas ke la pli fruaj lecionoj montras kiom da parolaĵoj estas eblaj sen verboj! La unua verbo — la perfekta tempo de la simpla formo — aperas nur en leciono 8; sed je tiu tempo la lernanto povas krei frazojn kiel “iliaj amikoj havas grandan domon en la urbo Kajro;” “estas nia devo atenti niajn lecionojn;” “ĝi estas en la plej granda tirkesto sub la libroj de Fatima.” Estas rimarkinde kiom da frazoj ne bezonas verbon — fakto de kiu ne ĉiu instrulibro-verkanto faras uzon, kies valoro tamen estas la sento pri potenco kiun tia procedo donas al la lernanto. Estas vere direble ke la libro de Cowan estas la plej bona de la lastatempaj libroj konstruitaj sen uzo de ĉiu ebleco de la novaj metodoj.

La plej kuraĝa dekliniĝo de la malnovaj metodoj de instruado de la araba estas sendube la *Lessons in Contemporary Arabic* (Lecionoj pri la Aktuala Araba Lingvo) kies unua parto enhavas lecionojn 1 ĝis 8. Tiu ĉi libro estas eldonita de la Centro por Aplikita Lingvistiko de la Modernlingva Asocio de Usono, en Washington, D.C., kaj ĝi aperis en 1960. Dua libro de 7 lecionoj ankoraŭ ne aperis. La antaŭparolo, “Pri la uzado de ĉi tiu libro” eksplikas plene la intencitan metodon. La libro kompreneble antaŭsupozas instruiston. Dum la aŭtoroj ne diskutas la prononcon de la lingvo, ili supozas ke la instruisto jam estas lerniginta la alfabeton al la lernanto, kaj ke estas senĉesa ekzercado de prononco dum ĉiuj partoj de la lernotempo. Ili metas la ŝarĝon sur la ŝultrojn de la instruisto. Ĉiu leciono enhavas 5 partojn. Ĝi komenciĝas per serio de bazaj frazoj kiujn oni devas lerni parkere; sekvas notoj gramatikaj, ekzercoj kaj praktikado, pliaj frazoj, “serio de frazoj kiuj enhavas lernitajn vortojn kaj konstruadon de novaj kunmetitaĵoj,” kaj finfine vortareton. Tute tra la lecionoj, fonetika transskribo akompanas vortaretojn, kaj fakte ĉiu araba vorto aperas samtempe ortografie kaj fonetike. La skribo aperas sen vokaloj; unu speco de hejmplatikado estas la skribado de la ekzercoj kun plena vokalumado. La gramatika

instruado estas konstanta, sed ĝi ne sekvas la kutimajn vortojn de “partoj de la parolado,” prenitaj unu post la alia. Ĉiu baziĝas sur la materialo enhavata en la bazaj frazoj, kaj tiuj ĉi dependas tute de la temo traktita, ne de gramatika ordo. Bezonas instruisto esti plene sperta pri la lingvo — kiel la aŭtoroj diras, kutime nasklingva arabo.

Post kiam oni estos tralaborinta tian kurson, ne estos malfacile formi scion de la literatura lingvo, utiligante libron kiel la *Anthologie Bilingue de la Litterature Arabe Contemporaine* (Dulingva Antologio de la Aktuala Araba Literaturo) de Vincent Monteil (Beyrouth, 1961), kiu enhavas ĉefverkojn de diversaj partoj de la araba mondo, kun franca traduko sur la kontraŭaj paĝoj.

Per ĉiuj tiuj ĉi manieroj, do, la libro de la CAL diferencas de pli fruaj libroj kaj montras plibonigojn. Ĝi formas parton de la “intensivaj kursoj” disvastigataj en Usono, aliformiĝo de la t.n. “rekta metodo,” la metodo lernigi sen traduko, kiu estiĝis ĉirkaŭ la komenco de ĉi tiu jarcento. La plej bone konata ekzemplo de tiu ĉi metodo estas tiu de la Berlitz lernejoj, kiuj eldonis ankaŭ araban kaj hebrean librojn.

Rilate la aplikadon de similaj metodoj al la lernigo de la hebrea, la historio komenciĝas iom pli malfrue. Estas vere ke tian aplikadon faris Prendergast dum la unua jardeko de la aktuala jarcento. Tio ĉi estas jam menciita kaj estos ankoraŭ malsupre menciata. Inspirite de Henry Sweet, Prendergast estis la unua instruisto kiu forlasis la malnovajn metodojn, sed lia verko ŝajnas nuntempe preskaŭ nememorata. Por komenci, en tiu okazo, de la plej moderna aplikado, estas necese menci i unue la libron de Rosen pri la israela hebrea lingvo. Kelkaj recenzoj aperintaj en la usona lingvistika gazetararo ne estis tre favoraj, sed ĝenerale oni rekonis la valoron de la libro. Eble la plej granda disputo kiu leviĝis pro ĝi estas la lernigado de la moderna lingvo de Israelo antaŭ la klasika lingvo

de la Biblio. Tio ĉi sekvigas ankaŭ la uzadon de ia moderna elparolado, kaj pri ĉi tio ankaŭ estas disputo. Ion alian necesos diri pli malfrue pri tio ĉi, sed se nun ĝi povus esti akceptata kvazaŭ cedita, restas sole la problemo de la metodo de prezentado. La verkanto sentas ke la libro enhavas ĉiujn bonajn punktojn de la nova maniero prezenti lingvoinstruadon. Ĝi komenciĝas per la objektoj kaj travivaĵoj de la ĉiutaga vivo, de la plej simplaj esprimoj, kaj antaŭeniras malrapide al la pli malfacilaj.

Ĝis la nuna momento ni diskutis librojn en kiuj aperas diversaj metodoj de lernigado. Tiuj ĉi diskutoj levigas multajn problemojn teoriajn kiujn nun estas necese traktadi, por ke oni respondu al la multspecaj duboj de la instruistoj de la hebrea lingvo, edukitaj per la malnovaj metodoj kaj suspekt-emaj pri la novaj kiel eble tro supraĵaj kaj nekapablaj konduki la lernanton sufiĉe profunde en la oceanon de la lingvo, speciale la biblia hebrea kaj la arama. Kion diri al ili rilate al tiuj ĉi diversaj duboj?

Eble la unua diskutindaĵo estas la ordo de la lernigaĵoj. Kiel oni povas aranĝi hebrean kurson laŭ la metodoj proponitaj en tiuj ĉi paĝoj? La sekcioj de la studado estus proksimume kiel sekvas:

1. Unue, preparo de la kurso. Parenteze oni povas diri ke la formigo de tia kurso necesigas multe pli da kompreno kaj laboro de la instruisto, ol la metodo preni jam preparitan instrulibron kaj sekvi ĝiajn lecionojn. Necesas antaŭrigardi la tutan kurson kaj projekti ĉiun detalon, por ke ĉio aperu je sia ĝusta loko. Tio ĉi inkludas la lokon kie ĉiu vorto lerniĝos. Jen kial la vortstatistiko estas grava; sed ne estas eble fari taŭgan vortkalkulon antaŭ ol oni faras ĝeneralan rigardon pri tio, kion oni volas havi en la tuta kurso. La du agoj iras man-en-mane. Tial oni unue demandas, "Kion mi volas lernigi?" Se oni respondos, "mi volas lernigi la komprenon de la Malnova Testamento en la originala lingvo," oni komencos

per studo de vortfrekvenco laŭ tia libreto kiel tiu de Watts, jam menciita. Tiel estos eble gradigi la vortojn lernendajn.

2. Sekvas la klasifiko de strukturaj faktoj pri la lingvo, la struktura analizo antaŭe citita. Tio restas ankoraŭ tasko farota, ĉar plena struktura studado de semidaj lingvoj ankoraŭ ne aperis. Fakte, kiel oni jam diris, nemultaj strukturaj lingvos-tudoj ekzistas kiujn la instruisto povus uzi. Rilate al la hebrea lingvo tia studo estas duoble necesa, rigardante la novan interpreton de la hebrea verbsistemo. Pri ĉi tiu temo Brockelmann diras: “la studo de la uzado de la semidaj tempoj estas ĝuste juĝita unu el la plej malfacilaj de la ĉapitroj de la semida sintakso, ĉar tio ĉi mem forte varias en la individuaj semidaj lingvoj, kaj nur malfacilege povas esti komparata kun la kategorioj de la hodiaŭaj hindeŭropaj lingvoj.”⁵ Aferoj tiaj bezonas esploradon kiam oni klopodas estigi gramatikan skemon de lingvo, kaj du lingvoj — mem proksimaj — povas tiom diferenci rilate al la uzo de tempoj ke ili bezonas malsaman traktadon en praktika lernolibro: ekzemple, la uzado de la estinta kaj perfekta tempoj en la angla lingvo kaj la franca aŭ la germana familiparola lingvo. Plue, la ofteco de gramatikaj konstruaĵoj devas esti konsiderata, kaj la malofteco de la sama konstruaĵo en unu lingvo kaj ties ofteco en alia povas aperigi ĝin en tute malsama periodo de studo: ree ekzemple la pasinta tempo, kiu aperas tre frue en studo de la angla lingvo sed multe pli malfrue en la franca, ĉar la moderna familiparola franca lingvo utiligas la perfektan formon, kiu angla-lingve havas malsaman signifon. La malsameco de la tempoj en la araba kaj hebrea lingvoj donas alian ekzemplon; en la arama la sistemo estas ankoraŭ malsama. La preparo de struktura analizo estas necesa por ke la lernigo de ĉiu elemento de la lingvo aperu apud la lernanto en la taŭga parto de la kurso. Li ne devas lerni sinsekve gramatikajn “partojn de la parolado,” kiu varias de lingvo al lingvo, sed laŭ lingva bezono komprenigi sin (se estas lingvo parolata) aŭ por faciligi lian progreson (se estas lingvo ne plu parolata sed studata nur pro sia literatura aŭ alia intereso).

Ĉiuj tiuj demandoj rilatas sole al la preparo; la studado ankoraŭ ne estas komencita de la lernanto. Ili estas postuloj kiujn la instruisto devas povi plenumi. Se li estas nasklingva parolanto, la situacio estas tute simila, kaj fakte la nasklingva parolanto povas koni la strukturon de sia lingvo eĉ malpli ol la eksterlandulo.

3. Post tio la enkonduko de la lernanto komenciĝos per lingvo parole prezentata. Rilate al lingvo parolata, ekzemple la araba aŭ la moderna siria, estas kompreneble sendube ke li lernos la veran prononcadon. Miaflanke mi kredas tutkore ke oni devus utiligi fonetikan aŭ latinalfabetan skribon por lernigi la prononcadon—kaj pli bone fonetikan skribon ol latinalfabetan transliterumon. La skribo de la Internacia Fonetika Asocio (IPA-skribo) bonege sufiĉas por ĉiuj celoj. Vere, ĝi necesigas specialajn presliterojn, sed hodiaŭ ĉi tio ne estas nekutime havebla. Mi kredas ankaŭ ke la lecionoj devus aperi dum la unua kvarono de la jaro tute en la fonetika skribo. Mi memoras mian enkondukon en la francan lingvon dum mia knabeco. Ĝi okazis tiamaniere, kaj mi ne dubas ke mi ŝuldas mian povon paroli la francan tute al ĉi tiu saĝa procedo de mia instruisto. La tempo de transiro de fonetika al normala ortografio formis poste valoran praktikad-periodon je la komenco de la dua kvarono de la jaro.

Rilate al la hebrea aŭ ia alia morta lingvo, tamen, la procedo starigas problemon, kian prononcon oni devas adopti, se ĉiuj estas rekonstruoj bazitaj sur teoria studado. Tiurilate mi ne estas certa. Kelkaj lecionoj de la hebrea kurso de Profesoro Schramm, de la Universitato de Berkeley, Usono, nun multobligitaj, estas bazitaj sur rekonstruita teoria elparolo; la libroj faritaj de judaj skribantoj estas bazitaj sur la moderna israela elparolo. Kiun sekvi? Mi konfesas simpation kun la moderna elparolo rilate al la hebrea, sed mi bone scias la malfacilaĵojn, ĉar kelkaj literoj estas neparolataj en la moderna lingvo, kiel en la malta lingvo. Tio tamen okazas multloke! Parolantoj de la angla ne povas ŝtonĵeti! Por la

verkanto la respondo estas do utiligi la modernan elparolon starigitan en Israelo. Se la instruisto volas lernigi la laringajn sonojn, li povos imiti la araban uzadon, sed estos tial necese ankaŭ restarigi aliajn elementojn de la sonsistemo kiuj estas pli dubaj. Rilate al morta lingvo la sciado estas pli grava ol la prononco: tio ĉi estas speciala cirkonstanco. Eĉ la grek-parolantoj kiuj tradukis la Septuaginton trovis malfacilon rilate al la laringaj sonoj!

4. Por aranĝi la ordon de la kurso rilate al la gramatiko, oni metu emfazon al la struktura analizo jam farita, laŭ bezono. Kiaj specoj de frazoj estas eblaj? Estas bone komenci per kunligitaj frazoj, kaj tio nepre ne estas neebla, kvankam malmultaj hebreaj lernolibroj agas tiel. Ne estas loko tie ĉi diskuti detalojn de la hebrea aŭ araba strukturo, sed inter la frazspecoj de ambaŭ lingvoj estas la senverbaj frazoj kiuj estas jam menciitaj rilate al la libro de Cowan. Ni komencu do per plenaj frazoj, uzante vortaron kies partoj interagas por produkti la plej grandan nombron da kompreneblaj frazoj. Unue eble ĉi tiuj frazoj ne interrilatos inter si, sed preskaŭ tuj la saĝa instruisto aranĝos kunligitajn (kvankam mallongajn) legotekstojn, ĉar li estas preparinta la vortliston laŭ ĉi tiu celo. La progreso tial estos pli rapida pro tio ke la intereso estos pli granda.

Rilate tiun ĉi temon, unu libro estas menciinda. Kelkaj libroj famiĝas, aliaj, egale bonaj, ne. Tiun ĉi mi renkontis preskaŭ akcidente, sed mi trovis ĝin bonega. La libro ne estas bazita sur la plej lastaj metodoj; ĝi utiligas tradukan metodon, sed ĝi enhavas senton por interesa kaj rekta lernado kiu estas vere ne tro alte taksebla. Ĝi estas *'brj lmd 'brjt, Hebrew For All* (Hebreo, Lernu la Hebrean Lingvon; Hebrea Lingvo Por Ĉiu) de Harold Levy, London, 1950, pri kio la ĉefrabeno de Anglujo en sia antaŭparolo skribis *"Hebrew For All* ne estas frazlibro kiu sciigas liston de nekunligitaj frazoj kiujn noveveninto en Israelo en ĉiu kazo havigus post kelkaj tagoj. Nek ĝi estas gramatiklibro kiu enuigas la studenton

sur la sojlo de ties studo per reguloj kaj reglamentoj regantaj lingvon kiun li ankoraŭ ne konas. Esence *Hebrew For All* estas serio de legaĵoj zorgeme gradigitaj, komence speciale verkita kaj poste adaptitaj el la ekzistanta literaturo, kiuj paŝon post paŝo kondukas la studenton de la plej simplaj frazoj al la hebrea interparolado, same kiel al kompreno de la hebrea preĝlibro kaj la hebrea Biblio.” Tio ĉi estas perfekta priskribo pri tre lerte verkita libro, kiu enhavas ĉiujn kvalitojn supre postultajn. La sola kontraŭparolo kiun klasikulo povus fari estas tio, ke la libro enhavas kaj modernan kaj klasikan biblian lingvon. Tio estas vera; sed dum, fakte, en la libro de Rosen la du aferoj estas apartigitaj kiel ne kunligeblaj, en apartaj sekcioj de la verko, en la libro de Levy la du aferoj estas interligitaj tiel ke oni ne sentas malsamon aŭ nekunligeblecon; ili formas unu tutaĵon, kaj certe la lernanto estos pli riĉa ĉar li ekhavis ambaŭ. Ĝi estas kiel eble plej proksima al “hebrea lingvo sen larmoj.”

Pri la hebrea lingvo tamen restas kelkaj problemoj nepre diskutendaj, kaŭze de tio, ke la lingvon oni kutime lernas malfrue, ne kiel temon studatan en la lernejo, sed kiel akademian edukaĵon lernatan de adoltoj, ofte profesiuloj aŭ pastroj estantaj aŭ estontaj. Ŝajnas do, unue, ke ne estas necese prepari kursojn kiel por junuloj, kaj, due, ke la studado devus esti multe pli profunda ol por ordinaraj lernejoj. Alivorte, vidante ke la hebrea lingvo estas kutime lernata je la universitata nivelo kaj kun speciala celo, kiel ĝi diferencas de lingvo studata je lerneja nivelo?

Ne estas, tamen, kontraŭdiro inter la du celoj. Eĉ je universitata nivelo oni devus komenci elemente, kaj la universitata lernigado emas progresi pli rapide ol la lerneja. La novaj, plejparte buŝaj, metodoj povas helpi tiun ĉi celon. Sed se oni akceptas la novan sistemon, je kiu momento oni transiros al teoria studado de la majstroverkoj de gramatiko kaj teknika studado de la traktaĵo? La du aferoj povas marŝi

kune, paŝon post paŝo. La studento lernos komence la elementojn de la lingvo laŭ la metodo supre skizita. Tuj kiam li majstros la skribon kaj tial povos legi ordinaran libron, oni povos atentigi lin pri la gramatiklibro post ĉiu leciono, kaj parto de la enhejma studo povos konsisti el studo de la teknika gramatiko pri la temo kiun li ĵus studis en la klaso. Oni procedas simile en la klasĉambro de modernaj lingvoj, sed je pli malfrua tempo. La pli grandaj aĝo kaj sperto de la lernantoj rapidigos la procedon, sen diferenco de principo.

La programo por studado por adoltaj lernantoj tial estos la sama kiel por junuloj, sed pli rapida kaj pli intensiva, enhavante pli da teorio ol kurso por junularo. Tiamaniere estas eble eviti la riproĉon ke la metodoj ĉi tie proponitaj estos ne sole pli simplaj por la lernanto sed samtempe pli malprofundaj. La metodaj malsamaj kiuj venas el la diverseco de aĝo kaj sperto de la lernantoj estas: 1. oni transiros al pli da lingva materialo; 2. oni povas akcepti gramatikajn eksplikojn pli facile ol por junuloj, speciale se la lingvo estas traktata kiel ekzemplo de ĝeneralaj lingvaj procesoj, kaj la lerno okazas per preparita struktura studado farita de la instruisto; 3. oni komencos legi biblian materialon kiel eble plej multe (sed ne pseŭdobibliajn, disigitajn frazojn), kaj dediĉos sin al kiel eble plej multa efektiva tekstlegado. Tie ĉi estas necese diri ke vasta legado, sen detala atento al ĉiu gramatikpunkto, estas tre utila por ĉiu lingvostudado. Ekzistas fakte du specoj de tekststudado: unua, la detala studado en kiu oni atentigas ĉiun menciindan gramatikpunkton; kaj dua, pli vasta kaj libera legado, en kiu la lernanto penas legi kiel eble plej multe, sen atento al ĉiu gramatika fakto, por ke li kutimiĝu al la "sento" de la lingvo, kion la germanoj nomas "sprachgefuehl." Tiu ĉi proceso estas egale necesa kaj valora kiel detala studado, speciale rilate al la vortoj, ĉar la lernanto povas kutimiĝi al novaj vortoj, vidante ilin fojon post fojo en la teksto. Mi menciis tie ĉi tre malnovan libron kiu montras tiun ĉi specon de studado de la hebrea lingvo: libron de Hermann

Hedweig Bernard, eldonitan en Londono en 1830 — longe antaŭ ol oni inventis la hodiaŭajn metodojn de lingvolernigado — *The Guide of the Hebrew Student* (La Gvidilo por la Studanto de la Hebrea Lingvo), kiu konsistas tute el legaĵoj pri variaj temoj, kutimigantaj al specialaj vortaroj pri la naturo, la metaloj, la diversaj temoj renkontataj en la Biblio, kaj gvidante al la legado de kontinuaj tiraĵoj el la Biblio mem. La libro enhavas ankaŭ vortaron kaj notojn pri la individuaj ĉapitroj. Rilate al la Biblio, la studanto havos jam almenaŭ supraĵan scion pri la historio kaj aliaj legaĵoj en ĝi, kaj legadi vaste kaj foje sen detala atento al la gramatiko donas al li povosenton kiu estas tre valora kaj forpuŝas lian senton pri obstaklo, donante al li “hejmsidsenton” en la lingvo. Plie, oni atendus ke la adolta studanto dediĉus multe pli da tempo al la studado ol la junulo.

Tial oni povas diri ke la novaj metodoj, kvankam supraĵe eble ili ŝajnos tro simpligi malfacilan studadon, vere ne estas malpli profundaj ol la malnovaj, kaj enportas pli da intereso, (diligenteco, kaj majstreco ol ili. En la manoj de bona instruisto estos facile intereson pri progreso al la studado de aliaj lingvoj parencaj al la fundamenta biblia hebrea — arama, kaj siria, kaj eĉ, pli malfrue, la ugarita. La aparteno de la ugarita al la studado de la Biblio komencas pli kaj pli aperi: oni rigardu la verketon de Mitchell Dahood, S.J., antaŭ ne longe eldonitan: *Proverbs and North West Semitic Philology* (Proverboj kaj Nordokcidenta Semida Filologio) Romo, 1963; mencii tiun libron ne nepre signifas akordi pri ĉio kion la aŭtoro diras en ĝi.

Ĉio ĉi signifas ke rilate al morta lingvo (biblia hebrea) mi ne konsilas sentradukan sistemon. Se oni lernos la israelan hebrean aŭ la araban lingvon por praktika uzado, mi firme jesas la ideon—lerni kaj ekzercadi kiel eble plej multe sentraduke, sed oni devas konsideri la celon de la studado, kiu ne estas paroladi la biblian lingvo, aŭ la araman, aŭ akadan, ktp.

Finfine, kial tiu ci ŝanĝo de instrumentoj? Simple, kaj sen pli da vortoj, por ke modernigite la metodoj elvoku pli da intereso kaj pli da studado de ĉi tiuj lingvoj. Ne estas eble nei la gravecon de la bibliaj lingvoj por la studanto de la biblia teologio. Oni vidas nuntempe novan intereson pri la Biblio kaj la disciencaj studoj. Je la bazo de ĉiu sukcesa scienca studo kuŝas la scio de la rilataj lingvoj. La nuntempo vidas senĉese pligrandiĝantan scion pri la Sankta Lando kaj la Meza Oriento, kaj nunaj kaj antikvaj, kaj samtempe kaj rezulte pli profundan scion pri la religio kiu leviĝis el tiu orienta mondo kaj estiĝis la nova voĵo de spirita vivo. Hodiaŭ estas la tago de renovigitaj bibliaj studoj: necesas tial ke la bibliaj lingvoj helpu meti ĉi tiujn studojn sur certegan fundamenton. Al ĉi tiuj studoj ankaŭ oni devas aldoni la dokumentojn de la Morta Maro, kun ilia grandega graveco kaj stimulantanta intereso. La eltrovo kaj eldono de la kopta Evangelio de Tomaso estas simile grava por la fako de koptaj studoj. La releviĝo de la juda ŝtato kaj la reviviĝo de la hebrea lingvo, la unuiĝo de la araba mondo kaj la etendiĝo de Islamo en Afriko estas faktoj kun supera graveco en la mondo, pro kiuj grandiĝas la neceso de lingvoscio.

Kaŭze de ĉio ĉi, ĉio kio povas grandiĝi la intereson pri la studo de la semidaj lingvoj devas esti elserĉata kaj uzata, kaj la modernigo de la instrumentoj ne estas la malplej gravaj el ĉi tiuj iloj de progreso sur la kampo de semidistiko.

* * *

Notoj

1. Bakalaŭro Teologia, diplomo en Australio.
2. La vorto *'ohel* memorigas la anglan vorton "O Hell!" ("Ho, Infero."), bone konata ekkrio inter angloj.
3. *Hebräische Grammatik* (1909); angla tr. *Hebrew Grammar* (1910).

4. Kaj en 1961, sub la titolo *A Student's Vocabulary of Biblical Hebrew* (Leksikono de la Biblia Hebrea Lingvo, por la Studanto) de George M. Landes, kun difinoj kaj aliaj helpoj. (noto de la red.)
5. Brockelmann, *Grundriss der Vergleichenden Grammatik der Semitischen Sprachen*, I-II, Berlin, 1908, 1913; 11:144, sekc. 70. Citita de Castellino, *The Akkadian Personal Pronoun and the Verbal System in the Light of Semitic and Hamitic*, Romo, 1962, p.60.

- - -

BIBLIOGRAFIO

Libroj cititaj en la antaŭa artikolo, kaj aliaj utilaj libroj.

1. Ĝenerala Lingvistiko por Instruistoj.

(a) *Revuoj.*

- IJAL: International Journal of American Linguistics (Trimonata Revuo). Baltimore.
- IRAL: International Review of Applied Linguistics in Language Teaching. Julius Groos Verlag, Heidelberg.
- Lg: Language: Journal of the Linguistic Society of America, (Trimonata Revuo), Providence. R. I.
- LL: Language Learning, A Journal of Applied Linguistics. (Trimonata Revuo) Ann Arbor, Usono.
- Lingua: Revue Internationale de Linguistique Générale (Trimonata Revuo). Amsterdam.
- Word: Journal of the Linguistic Circle of New York (Trifoje per jaro) New York.

(b) *Libroj.*

Alarchos Llorach, E.

1950 Fonología Española, Madrid.

1951 Gramática Estructura, Madrid (laŭ la teorio de Hjelmslev)

Barr, J. 1961. The Semantics of Biblical Language, Oxford University Press

Bloomfield, L. 1933. Language. New York.

Chomsky, N. 1957. Syntactic Structures. La Hago.

Elson D & Pickett V. B.

1960. Beginning Morphology-Syntax. Santa Ana, Calif. Usono.

Ferguson C. A. & Stewart W. A.

1963. Linguistic Reading Lists for Teachers of Modern Languages (Lingvaj Legolistoj por Instruistoj de Modernaj Lingvoj, ĝenerala listo, sekvata de specialaj listoj franca, germana, itala, rusa kaj hispana). Center for Applied Linguistics, Washington D. C. Usono.

Gleason H. A.

1961. Introduction to Descriptive Linguistics. (2a eldono) Gravit F. W. & Valdman R. A.

1962. Structural Drill and the Language Laboratory. IJAL publikaĵo 27, (Indiana University Research Center in Anthropology, Folklore and Linguistics).

- Hall Jr. R. A.
Linguistics and Your Language (Broŝuraĵo; komence eldonita kiel 'Leave Your Language Alone!')
- Harris Z. S.
1947. Methods in Structural Linguistics (eldonita broŝure 1963 kiel "Structural Linguistics")
- Heffner R. M. S.
1949. General Phonetics. Madison, Usono
- Hjlemslev.
1943. Omkring Sprogteoriens Grundlaeggelse. Kopenhago. (Angla Traduko 1961 de Whitfield kiel "Prolegomena to a Theory of Language")
- Hockett, C. F.
1955. A Manual of Phonology. Baltimore, Usono
1958. A Course in Modern Linguistics. New York.
- Josselson, H. H.
1953. The Russian Word Count.
- Longacre, R. E.
1960. String Constituent Analysis. *Language*, Vol. 36; 63-85.
- Malmberg B.
1954. La Phonétique. Paris. Eldonita angle 1963 kiel "Phonetics".
- Martinet A.
1949. Phonology as Functional Phonetics. Oxford
1961. Eléments de Linguistique Générale. Paris.
1962. A Functional View of Language. Oxford.
- Najan W. (redakt.)
1962. Materials and Techniques for the Language Laboratory. IJAL. (Indiana University)

Research Center in Anthropology,
Folklore and Linguistics publikaĵo 18)

Nida, E. A.

1949. Morphology: The Descriptive Analysis of Words. 2a eldono. Ann Arbor, Usono.
1950. Learning a Foreign Language. New York.

Pike, K. L.

1943. Phonetics. Ann Arbor.
1947. Phonemics. Ann Arbor.

Postal, P.

1983. Constituent Structure: A Study of Contemporary Models of Syntactic Description. IJAL Publikaĵo 30. (Indiana University Research Center in Anthropology, Folklore and Linguistics) Reformatskij, A. A.
1960. Vvedenie y Jazvkoznanie. Moskvo (Enkonduko en Lingvistikon).

Sapir, E.

1921. Language. New York.

de Saussure, F.

- 1916 & 1949 Cours de Linguistique Générale. Paris. Eldonita angle 1959 kiel "A Course in General Linguistics," London).

Ekzemploj de komparativaj strukturaj studoj rekomenditaj en tiu ĉi artikolo: serio red. C. A. Ferguson, Center for Applied Linguistics, "Comparative Structure Series":

W. Gage, Grammatical Structures of English and Russian.

H. Kufner, Grammatical Structures of English and German.

2. Araba Lingvo

Asin y Palacios, M.

- 1950 Crestomatía de Arabe Literal, Madrid.
- Brill, M.
- 1940 Basic Word List of the Arabic Daily Newspaper. Jerusalem
- Ferguson, C. A.
- 1960 Lessons in Contemporary Arabic, CAL.
- Monteil, V.
- 1962 Anthologie Bilingue de la littérature Arabe Contemporaine. Beyrouth.
- Rabin, C.
- 1947 *Arabic* (en Lund Humphries, *Modern Language Readers*) London.
- Schramm, G. M.
- 1962 Outline of the Classical Arabic Verb Structure, *Language* 38:360-375
- Scott, L. C.
- 1962 Structural Arabic, London.
- Segal, V. S.
- 1962 Nacalnyj Kurs Arabskogo Jazyka. Moscow
- Sheringham, A. T.
- 1927 Modern Arabic Sentences. London
- Trager, G. L. and F. A. Rice
- 1954 Personal Pronoun System of Classical Arabic. *Lg.* 30:224-239. Vidu ankaŭ noton de E.P. Hamp: Personal Morphemes of Classical Arabic, *Studies in Linguistics* 14:21-22 (1959)
- Yuŝmanov, N. V.
- 1961 Structure of the Arabic Language; tradukita el la rusa, CAL.
3. *Hebrea Lingvo*
- Bernard, H. H.
- 1839 Guide of the Hebrew Student, London. (Gvidilo de la hebrea studanto)

Modernaj Metodoj

Brockelmann

1908 Grundriss der Vergleichenden Grammatik der Semitischen Sprachen, I-II. Berlin.

Costellino, G. R.

1962 The Akkadian Personal Pronouns and the Verbal System in the Light of Semitic and Hamitic, Rome, p. 60

Driver, G. R. 1936

Problems of the Hebrew Verbal System, Edinburgh.

Harper, Wm. R.

1959 (a) Elements of Hebrew, Revised by J. M. Powis-Smith, Chicago.
(b) Introductory Hebrew. Ambau estas reldonoj de libroj unuafoje eldonitaj en 1885.

Klausner, J.

1949 Hlšwn h'brjt-lšwn ĥjh, Jerusalem, (2a eldono)

Levy, H.

1950 'brj lmd-'brjt, Hebrew for all. London

Prendergast, T.

1909 Mastery Series; Hebrew. London

Rabin, C.

1949 *Hebrew*, (en Lund Humphries, *Modern Language Series*), London

Rosén, A.

Israeli Hebrew.

Watts. J. D. W.

1959 Lists of words occurring frequently in the Hebrew Bible, Brill Leiden (volumeto) 'Listoj de Vortoj ofte okazantaj en la hebrea Biblio')

Yates, K. M.

1938 Essentials of Biblical Hebrew, New-York London.

4. *Kopta Lingvo*

Barsoum, M.

1963 *Se Enho Elthbetk*, (100 pp.) Cairo

Metzger, B. M.

1961 *List of Words Occurring Frequently in the Coptic Old Testament*.

Murray, M. A.

1927 *Elementary Coptic (Sahidic) Grammar*. London5. *Siria Lingvo*

Brockelmann, C.

1955 *Syrische Grammatik*. Leipzig

Costar, L.

1955 *Grammaire Syriaque*. Beyrouth

Kobert, R.

1952 *Textus et Paradigmata Svriace*. Rome

Robinson, T. H.

1954 *Paradigms and Exercises in Svriac Grammar*. OUP 3a eld.

LA APOSTOLO (T)ADDAJ

tr. Donald Broadribb

Antaŭkomento

Inter la multaj legendoj kiuj estis popularaj dum la frua parto de nia epoko pri la agado de la apostoloj estis la legendo pri Addaj, aŭ Taddaj. Ĉu, kiel en multaj legendoj, troveblas originala kerno da historio ne eblas diri. Addaj /Taddaj estas unu el la 12 disĉiploj en Mateo 10:3 = Marko 3:18, sed la legendo simple nomas lin “unu el la 70.”

Kio interesis la kristanaron, tamen, ne estis la rakonto pri la aventuroj de tiu apostolo mem, sed la fakto ke la legendo ankaŭ raportis la tekston de letero de Jesuo. En la Biblio mem ni ne trovas indikon ke Jesuo iam verkis ian tekston, sed ni ankaŭ ne trovas indikon ke li ne faris tion. Tio estas grava, ĉar nur posta tradicio inventis la “fakton” ke “Jesuo nenion skribis.” La frua kristanaro estis konvinkita ke ĝi posedis tekstojn verkitajn de Jesuo. La letero, kiun oni trovas sube, estis konsiderata parto de la Biblio de multaj kristanoj dum longa tempo.

Estas evidente, pro la teksto de la letero mem, ke ĝi estas malaŭtentika. Tamen, ĝi spegulas la ideojn de la frua kristanaro, kaj pro tio havas sian valoron.

Ĉisube mi prezentas du tekstojn: la unua estas raporto verkita de Eusebius (ĉ. 260-340 A. K.), kaj estas parto de lia “Historio de la Eklezio.” La traduko estas laŭ la arama (siria) teksto, kvankam laŭ la enhavo la originalo de Eusebius estis greka. La kaŭzo de prefero por la arama teksto estas ke la legendo estis populara en la arama lingvo, kaj la arama versio de la Eusebiusa teksto estis konformigata al la originala arama teksto, kiun ni ne plu posedas.

La dua teksto estas la legendo kiu estis populara en la ararna lingvo, sed en formo pli nova ol tiu de Eusebius. Ĝi konservas, tamen, plurajn trajtojn de la originala formo de la legendo, kaj per komparo de ambaŭ oni povas ekkoni la karakteron de la originalo. La dua teksto estas traduko de la arama teksto eldonita de Carl Brockelmann (en sia *Syrische Grammatik*).

La portreto menciita en la dua teksto aludas al la populara opinio mezepoka ke ekzistas aŭtentikaj portretoj pri Jesuo. Tia portreto ŝajne neniam ekzistis, sed pluraj malaŭtentikaj estas konataj.

EUSEBIUS PRI TADDAJ

(“Historio de la Eklezio”, ĉapitro 13)

Dektria Ĉapitro: Pri la Reĝo de Edessa:

La dektria koncernas Taddajn: kiel li estis modelo, kiam oni predikis la evangelion pri nia Savanto kaj Mastro Jesuo Kristo al ĉiuj homoj.

Pro la mirakloj kiujn li (= Jesuo) faris, miloj da homoj, eĉ de lokoj malproksimaj de la lando Judujo, afliktataj de ĉiaj malsanoj, venis al li kun espero pri resaniĝo. Ankaŭ la reĝo Abgar, kiu estis fama inter la homoj oriente de la Eŭfrato pro sia braveco, estis afliktata de severa malsano, por kiu neniu kuracilo ekzistis inter homoj. Kiam li aŭdis informon pri la nomo de Jesuo, kaj la mirakloj kiujn li faris — pri kiuj ĉiu atestis — li sendis petleteron per servisto, por peti ke li venu kaj kuracu lian malsanon.

Kiam la Savanto legis ĝin, li rifuzis. Sed li estimis la leteron, kaj li promesis sendi unu el siaj disĉiploj por kuraci lian malsanon kaj por doni Vivon al li kaj al ĉiuj kolegoj liaj. Li ne prokrastis plenumi sian promeson, post sia leviĝo el la

(T)addaj

morto kaj supreniro al la ĉielo. La apostolo Toma, unu el la 12, sendis Taddajn — kiu estis unu el la 70 disĉiploj de Kristo — al Edessa, kvazaŭ pro la insisto de Dio, por esti proklamanto kaj predikanto de instruo pri Kristo. Tiel, la promeso de Kristo plenumiĝis per li. Oni lernas pri lia historio per dokumentoj troviĝantaj en Edessa, kiuj pritraktas la periodon kiam ĝi estis reĝlando. En la historiaj dokumentoj tie estas raporto pri ĉio farita tie, ek de la plej frua tempo ĝis Abgar. Oni ankaŭ povas trovi konservata tie raporton pri ĉio farita tie post li. Nenio malhelpas nin legi la leterojn konservitajn por ni en la arkivo, ĉar ekzistas kopio de la vortoj. Ni tradukas ilin el la arama lingvo greken:

Kopio de la letero kiun la reĝo Abgar sendis al Jesuo, per Ĥnnj' la Impostisto, en Jerusalemo

Abgar Ukama, reganto, al la Bona Savanto Jesuo, trovebla en Jerusalemo: Saluton.

Mi aŭdis ke via kuracado ne estas farata per medikamentoj kaj radikoj: oni diras ke vi donas vidpovon al blinduloj, ke lamuloj promenas, ke vi sanigas leprulojn, ke vi eligas malbonajn spiritojn kaj demonojn, ke vi sanigas personojn jam delonge suferintajn, ke vi vivigas mortintojn.

Aŭdinte ĉion ĉi pri vi, mi faris du konkludojn: vi estas aŭ Dio mem, kiu venis el la ĉielo por fari tion ĉi; aŭ vi estas dia, por fari tion ĉi. Konsekvence, mi skribas por peti ke vi bonvolu veni al mi kaj kuracu mian malsanon.

Krome, mi informiĝis ke la judoj komplotas kontraŭ vi, kaj planas atenci vin. Mi havas belan, malgrandan urbon, kiu estas sufiĉe granda por du.

Kopio de la mesaĝo de Jesuo, sendita per Ĥnnf' la Impostisto, al la reganto Abgar

Benata estas kiu akceptas min kvankam li ne vidis min.

Estas skribite pri mi, ke kiuj min vidis ne akceptos min, sed kiuj min ne vidis akceptos min kaj Vivos. Nu, rilate vian peton ke mi venu al vi: mi ankoraŭ ne finis ĉi tie la aferojn por kiuj mi sendiĝis. Kiam mi finos ilin, mi supreniros al tiu kiu sendis min. Sed post mia supreniro, mi sendos al vi unu el miaj disĉiploj. Li kuracos vian malsanon, kaj li ankaŭ donos Vivon al vi kaj al viaj kolegoj.

Aldone al tiuj leteroj, ankaŭ ĉi tio legeblas, en la arama lingvo:

Kiam Jesuo estis suprenirinta, Ihuda Toma sendis la apostolon Taddaj, unu el la 70. Li venis, kaj ekloĝis ĉe Tobija bar Tobija.

Kiam oni aŭdis pri li, oni raportis al Abgar: “la apostolo de Jesuo venis ĉi tien, kiel li promesis al vi.” Taddaj komencis kuraci ĉiun malsanon kaj suferon, per la potenco de Dio, tiel ke ĉiu miregis.

Kiam Abgar aŭdis pri la mirakloj kaj kuracoj kiujn li faris, li konkludis ke jen la persono pri kiu informis Jesuo, kiam li diris “mi supreniros, kaj mi sendos al vi unu el miaj disĉiploj. Li kuracos vian malsanon.” Li sendis kaj vokis Tobijan, ĉe kiu li loĝis, kaj diris al li: “Mi lernis ke mirinda viro venis loĝi ĉe vi. Venigu lin al mi.”

Kiam Tobija venis al Taddaj, li diris al li, “La reĝo Abgar sendis kaj vokis min. Li diris ke mi konduku vin al li, por kuraci lin.”

Taddaj diris, “Mi iros, ĉar mi estas sendita al li por fari miraklon.”

Do Tobija, frue dum la posta tago, kondukis Taddajn al Abgar. Kiam ili iris tien, nobeloj ĉeestis. Subite, dum li venis, eksterordinara vizio venis al Abgar pri la aspekto de la

(T)addaj

apostolo Taddaj. Kiam Abgar do vidis Taddajn, li ekadoris lin. Mirego kaptis ĉiun apudstaranton, ĉar ili ne vidis la vizon, ĝi ja aperis nur al Abgar.

Li demandis al Taddaj, “Ĉu vi vere estas disĉiplo de la dia Jesuo? Ĉar li diris al mi, ‘mi sendos al vi unu el miaj disĉiploj. Li kuracos vian malsanon, kaj li ankaŭ donos Vivon al vi.’”

Taddaj respondis, “Ĉar vi tiel sincere akceptas tiun kiu sendis min, tial mi estas sendita al vi. Se vi vere akceptas lin, via deziro plenumiĝos.”

Abgar diris al li, “Mi ja tiom akceptas lin, ke mi kondukus armeon por detruigi la judojn kiuj krucumis lin — sed mi ne povas, pro la roma imperio.”

Taddaj diris, “Nia Mastro plenumis la volon de sia Patro. Plenuminte ĝin, li supreniris al sia Patro.”

Abgar diris al li, “Ankaŭ mi akceptas lin kaj lian Patron.”

Taddaj diris, “Konsekvence, mi metos mian manon sur vin, nome de li.” Kiam li faris tion, li tuj kuraciĝis el sia malsano kaj el la doloro kiu afliktis lin. Abgar miregis ke ĝuste kiel li aŭdis pri Jesuo, same li efektive vidis per lia disĉiplo Taddaj: ke li ne kuracis per medikamentoj aŭ radikoj. Li kuracis ne nur lin, sed ankaŭ Abdun bar Abdu, kiu suferis pro podagro, ĉar ankaŭ li venis por kliniĝi antaŭ li. Kiam li preĝis por li, li kuraciĝis. Li ankaŭ kuracis multajn aliajn personojn de la urbo. Li faris miraklojn, kaj predikis la Vorton de Dio.

Post tio, Abgar diris al li, “Taddaj, vi faras ĉi tion per la potenco de Dio, kaj ni miregas pro ĝi. Sed, ni petas ke vi rakontu al ni pri la advento de Kristo — kia estis ĝi? Kaj pri lia potenco, kaj per kiu potenco li faris ĉion kion ni aŭdis pri

li.”

Taddaj diris, “Ĝis nun mi silentis. Sed, ĉar mi estas sendita por prediki la Vorton de Dio, morgaŭ grupigu al mi ĉiujn homojn de via urbo. Mi predikos antaŭ ili, kaj semos en ili vivajn vortojn pri la advento de Jesuo — kia ĝi estis, kaj pri lia misio, por kiu li estis sendata de sia patro. Kaj pri lia potenco, kaj liaj agoj, kaj pri la sekretoj kiujn li proklamis en la mondo, kaj pri per kiu potenco li faris tion, kaj pri lia nova evangelio, kaj pri lia juneco, kaj pri lia afliktiĝo: kiel li afliktis kaj nuligis kaj senigis sin, kaj estis krucumata, kaj malsupreniris al Ŝeol. Ke li rompis barierojn kiuj neniam antaŭe rompiĝis, kaj vivigis mortintojn. Li subiris sola, sed li supreniris al sia patro akompanate de granda amaso.”

Do Abgar ordonis ke en la mateno ĉiuj urbanoj grupiĝu por aŭskulti la predikadon de Taddaj. Post tio, li ordonis ke oni donu al li oron kaj arĝenton. Sed li ne akceptis. Li diris, “se ni ja forlasis tion kio estis nia, kiel ni povus preni tion kio apartenas al aliaj?”

Ĉi tio okazis en la jaro 340. (= 28 p. K.)

LA INSTRUO DE LA APOSTOLO ADDAJ

(Legenda teksto, ne datebla, el Edessa)

Dum la 343a jaro de la greka regno (= 31 p. K.), dum la regado de nia romana mastro Tiberis Qesar, dum la regado de Reĝo Abgar bar Ma’nu, je la 12a de Frua Teŝri (proks. oktobro), Abgar Ukama sendis nobelojn de la regno, Marjahab kaj Ŝmeŝgram, kun la lojala impostisto Ĥanan, al la urbo Eleuterapolis (arame: Bejt Gubrin), al la prokuratoro de nia mastro Qesar, la nobela Sabinus bar Eustargis. Li estis la reganto de Sirio, Fenikio, Palestino kaj tuta Mesopotamio. Ili portis al li leterojn pri ŝtataj aferoj. Kiam ili venis al li, li akceptis ilin ĝoje, kaj honoris ilin. Ili restis kun li 25 tagojn.

(T)addaj

Li skribis respondon al la leteroj, kaj resendis ilin al Reĝo Abgar.

Kiam ili forlasis lin, ili veturis laŭ la vojo al Jerusalemo. Ili vidis multajn homojn, kiuj venis el tre malproksime por vidi Kriston — ĉar raporto disiris al malproksimaj lokoj pri liaj nekredablaj mirakloj. Kiam Marjaha kaj Ŝmeŝgram kaj Ĥanan la Impostisto vidis la homojn, ili ekakompanis ilin al Jerusalemo. En Jerusalemo ili vidis Kriston, ĝoje kun la amaso kiu akompanis ilin. Ili ankaŭ vidis la judojn kiuj stariis en grupoj komplotante pri li. Ĝenis la judojn trovi ke tiom el ili mem adoras lin.

Ili restis dek tagojn en Jerusalemo. Ĥanan la Impostisto skribis ĉion, kion li vidis Kriston fari, kaj ankaŭ ĉion, kion li faris antaŭ ol ili venis tien. Post sia rigardo, ili reiris al Edessa, kaj revenis al Reĝo Abgar, ilia mastro kiu sendis ilin. Ili donis al li la respondon al la leteroj kiujn ili portis kun si. Post la legiĝo de la letero, ili informis la reĝo pri kion ili vidis, kaj kion faris Kristo en Jerusalemo. Ĥanan la Impostisto legis al li ĉion, kion li skribis kaj kunportis. Kiam Reĝo Abgar aŭdis, li miregis, kaj ankaŭ la nobeloj kiuj ĉeestis. Abgar diris al ili, “Tiaj mirakloj ne estas homaj. Nur Dio sola povas revivigi mortintojn.”

Nu, Abgar mem volis transiri al Palestino por vidi per siaj propraj okuloj kion faras Kristo. Sed li ne povis transiri al roma teritorio kiu ne apartenas al li, por ne vekii malami-kecon per tio. Do li skribis leteron kaj sendis ĝin per Ĥanan la Impostisto al Kristo. Ĥanan forlasis Edessan je la 14a de Addar (proks. marto), kaj atingis Jerusalemon je la 12a de Nisan (proks. aprilo), merkredo. Li trovis Kriston en la domo de la juda rabeno Gamaliel. La letero estis legata al li, ĝia teksto estis:

Abgar Ukama al la bona kuracisto Jesuo, trovebla en

Jerusalemo: Salutojn, sinjoro.

Mi aŭdis pri vi kaj via kuracado, ke vi ne kuracas per medikamentoj kaj radikoj, sed per via nura vorto vi donas vidpovon al blinduloj, vi promoenigas lamulojn, vi sanigas leprulojn, vi aŭdigas surdulojn, vi kuracas frenezulojn, per via vorto vi sanigas suferantojn, vi eĉ revivigas mortintojn.

Aŭdinte pri tiuj multaj mirakloj kiujn vi faras, mi konkludis: vi estas aŭ Dio kiu venis el la ĉielo por fari ĉion ĉi, aŭ vi estas dia ĉar vi faras ĉion ĉi. Konsekvence, mi skribas por peti ke vi venu al mi por ke mi adoru vin, kaj por kuraci malsanon kiun mi havas, por ke mi akceptu vin.

Krome, mi informiĝis ke la judoj komplotas kontraŭ vi, persekutas vin, ke ili intencas malbonfari al vi, eĉ ke ili planas krucumi vin. Mi regas ĉi tiun belan malgrandan urbon, kiu estas sufiĉe granda por ke du loĝu sekure en ĝi.

Kiam Jesuo ricevis la leteron en la domo de la juda ĉefpastro, li diris al Ĥanan la Impostisto: “Iru, diru al via mastro kiu sendis vin al mi — Benata estas vi, ĉar kvankam vi ne vidis min, tamen vi akceptas min. Estas skribite pri mi ke kiuj min vidos ne akceptos min. Nu, rilate al via peto ke mi venu al vi: mi finis la taskon por kiu mi sendiĝis ĉi tien, kaj mi supreniros al mia Patro kiu sendis min. Sed suprenirinte al li, mi sendos al vi unu el miaj disĉiploj, kiu kuracos vian malsanon kaj sciigos al ĉiu kun vi pri Vivo. Via urbo estos benata, kaj malamiko neniam denove regos ĝin.”

Kiam Ĥanan la Impostisto aŭdis ke Jesuo tiel parolas al li, li faris portreton pri Jesuo per artkvalitaj farboj. Li ja estis la reĝa pentristo. Li portis ĝin al sia mastro, Reĝo Abgar. Kiam Reĝo Abgar vidis la portreton, li prenis ĝin kun granda ĝojo, kaj honorplene metis ĝin en unu el la ĉambroj de sia palaco. Poste, Ĥanan la Impostisto rakontis al li ĉion kion li aŭdis de Jesuo.

Kiam la aferoj skribitaj en la Biblio estis faritaj al li, kaj Kristo estis suprenirinta al la ĉielo, Ihuda Toma sendis la apostolon Addaj al Abgar. Li estus unu el la 72 apostoloj. Veninte al la urbo Edessa, Addaj ekloĝis en la domo de Tobija bar Tobija, judo veninta el Palestino. Oni aŭdis pri li en la tuta urbo.

Unu el la nobeloj de Abgar raportis pri Addaj; lia nomo estis Abdu bar Abdu, li estis unu el la ĉefcivitanoj de Abgar:

“Mesaĝisto venis kaj loĝas ĉi tie. Li estas tiu pri kiu Jesuo promesis, kiam li diris ‘Mi sendos al vi unu el miaj disĉiploj.’”

Kiam Abgar aŭdis pri la grandaj mirakloj kiujn Addaj faras, kaj la mirigaj kuracoj kiujn li faras, li konvinkiĝis ke vere li estas tiu pri kiu Jesuo promesis ‘Suprenirinte al la ĉielo mi sendos al vi unu el miaj disĉiploj, kiu kuracos vian malsanon.’”

Do Abgar sendis kaj vokis Tobijan, kaj diris al li, “Mi aŭdis ke mirinda viro venis loĝi ĉe vi. Venigu lin al mi. Eble mi povas prave esperi ricevi sanon de li.”

Do Tobija, frue dum la posta tago, kondukis la apostolon Addaj al Abgar. Addaj komprenis ke li estis sendata al li de la potenco de Dio. Kiam li iris al Abgar, ties nobeloj ĉeestis. Ĝuste kiam li estis antaŭ la pordo, miriga vizio venis al Abgar pri la aspekto de Addaj. Tuj kiam la vizio venis, Abgar falis kaj ekadoris Addajn. Mirego kaptis ĉiun kiu staris antaŭ li, ĉar ili ne vidis la vizion kiu aperis al Abgar.

Diris Abgar al Addaj: “Vi vere estas disĉiplo de la dia, potenca Jesuo. Li sendis informon al mi, ‘Mi sendos al vi unu el miaj disĉiploj por kuraci kaj vivigi.’”

Addaj diris al li, “Ĉar vi jam akceptas tiun kiu sendis min al vi, tial mi estas sendita al vi. Se vi vere akceptas lin, ĉio kion vi anticipas de li estiĝu por vi.”

Abgar diris al li, “Mi tiom akceptas lin, ke mi kondukus armeon por detruĵi la judojn kiuj krucumis lin — sed mi ne faris tion, ĉar ekzistas packontrakto inter la roma imperio kaj mi, kiun mi faris kun nia mastro Qesar Tiberis, same kiel miaj patroj antaŭ mi.”

Addaj diris al li, “Nia Mastro plenumis la volon de sia Patro. Plenuminte la volon de sia naskiginto, li altiĝis al sia Patro kaj sidiĝis kun li en gloro, same kiel jam de ĉiam.”

Abgar diris al li, “Antaŭ mi akceptas lin kaj lian Patron.”

Addaj diris al li, “Ĉar vi tiel kredas, mi metos mian manon sur vin nome de tiu kiun vi akceptas.”

Kaj je tiu momento, kiam li metis sian manon sur lin, li kuraciĝis el la malsano kiu afliktis lin delonge. Abgar miregis ke ĝuste kiel li aŭdis ke Jesuo sanigis tiel, ankaŭ Addaj sanigas sen surmeti ion, nur per la nomo de Jesuo. Ankaŭ Abdu bar Abdu suferis pro podagro en siaj piedoj, do li atentigis lin pri siaj piedoj. Addaj metis sian manon sur ilin kaj kuracis ilin. La podagro neniam revenis al li. En la tuta urbo li kuracis multajn malsanojn, farante miraklojn tie.

Abgar diris al li, “Nun ĉiu scias ke vi faras tiujn miraklojn per la potenco de Jesuo Kristo. Ni miregas pro viaj agoj. Nun mi petas vin, rakontu al ni pri la advento de Kristo — kia estis ĝi? Kaj pri lia glora potenco, kaj pri la mirakloj kiujn li faris, laŭ nia aŭdo, kaj kiujn vi vidis kun viaj aliaj kolegoj,”

Addaj diris al li, “De nun mi ne ĉesos proklami, ĉar tial mi estas sendita ĉi tien, por paroli kaj instrui al ĉiu kiu volas, por ke oni kredu same kiel vi. Morgaŭ grupigu la tutan urbon al mi, kaj mi semos en ĝi la vivajn vortojn de la evangelio, kiujn mi jam proklamas antaŭ vi,”

La postan tagon Abgar ordonis al Abdu bar Abdu, kiu estis kuracita el la ĝena piedmalsano, ke li sendu heroldon kiu krii tra la tuta urbo, por ke la tuta homaro kolektiĝu — viroj kaj virinoj — en la loko nomita Bejt Tbara, en la granda placo Bejt ŭida, por ke ili aŭdu la instruon de la apostolo Addaj.

Kiam la tuta urbo kolektiĝis, viroj kaj virinoj, la apostolo Addaj instruis ilin pri fido al nia Mastro Jesuo Kristo. Li diris al ili, “Kiuj akceptas la vortojn de Kristo restu apud ni; ankaŭ kiuj volas partopreni preĝadon kun ni. Poste ili iru al siaj domoj.”

La apostolo Addaj ĝoje vidis grandan nombron de la urbanoj restanta kun li. Eĉ la malmultaj kiuj ne restis tiam, post kelkaj tagoj akceptis liajn vortojn kaj ekkredis la predikadon pri la evangelio de Kristo.

Kiam Reĝo Abgar vidis ke la tuta urbo ĝojas pro lia instruo, ankaŭ li diris al la apostolo Addaj, “Nun, kie ajn vi volas, konstruu preĝejon, renkontiĝejon por tiuj kiuj ekkredis kaj ekkredas pro viaj vortoj. Kiel vin ordonis via Mastro, servu lin dece kiam vi devus. Kaj al tiuj instruistoj de la evangelio kiuj estas kun vi, mi estas preta doni grandajn donacojn por ke ili ne devu fari alian laboron ol servi. Kion ajn vi finance bezonos por la domo mi donos al vi senlime. Tiel via vorto estos la ordonanto en ĉi tiu urbo. Kiel neniu alia, vi povos eniri al mi laŭvole en mian gloran reĝan palacon.”

Kiam Reĝo Abgar reiris al sia reĝa palaco, li kun siaj nobeloj tre ĝojis. Ankaŭ ili kun ĝojo en la koro gloris Dion kiu turnis iliajn pensojn al si. Ili ĉesigis sian idolismon kiun ili faradis kaj akceptis la evangelion de Kristo.

Kiam Addaj konstruis la preĝejon, ili portis al ĝi donacojn kun la urbanaro. Kaj tie ili servis dum sia tuta vivo.

Kiam la ĉefpastroj de la urbo, Ŝŭida kaj Abd Nbu, vidis

la miraklojn kiujn Addaj faras, ili rapidis detrui la altarojn sur kiuj ili oferis al Nebu kaj Bel (iliaj dioj), krom la altaro granda en la centro de la urbo. Ili kriis, “Vere ĉi tiu estas disĉiplo de tiu granda, lerta, glora persono pri kiu ni aŭdis ĉion faritan en Palestino.”

Addaj akceptis al si ĉiun, kiu ekkredis je Kristo, kaj baptis ilin nome de la Patro, la Filo, kaj la Sankta Spirito. Ankaŭ judoj kiuj sciis la Leĝon kaj la Profetojn, ŝtof-vendistoj, konvinkiĝis, konvertiĝis, kaj konfesis ke Kristo estas la Filo de la Vivanta Dio. Sed nek Reĝo Abgar nek la apostolo Addaj devigis iun perforte, ke li kredis je Kristo. Aggaj, silkisto kaj faristo de reĝaj tiaroj, Palut, Abŝlama, Bar Samja, kaj iliaj kolegoj, aliĝis al la apostolo Addaj. Li akceptis ilin kaj partoprenigis ilin en la servado. Ili legis la Malnovan kaj Novan Testamentojn, la Profetojn, kaj la Agojn de la Apostoloj ĉiutage kaj meditadis pri ili.

Post la jaro kiam la apostolo Addaj konstruis la preĝejon en Edessa kaj akiris ĉion necesan por ĝi, kaj instruis grandan nombron da personoj de la urbo, li konstruis preĝejojn en la aliaj malproksimaj kaj proksimaj urbetoj. Li ornamis ilin kaj starigis pastrojn kaj presbiterojn en ili. Ili legis la Bibliion kaj li instruis ilin pri ĝi. Li instruis la arton de pastrado interna kaj ekstera. Post ĉio ĉi, fatala malsano atakis lin. Li vokis Aggajn antaŭ la tuta kongregacio de la preĝejo. Li venigis lin kaj faris lin estro, direktoro. Paluton, kiu estis diakono, li faris episkopo. Abŝlaman, kiu estis skribisto, li faris diakono. Post tri tagoj, dum kiuj li aŭdis kaj akceptis ateston pri instruado de la evangelio de la servantoj, antaŭ ĉiuj nobeloj li forlasis ĉi tiun mondon: ĵaŭde, la 14an de Ijar (proks. majo). La urbo havis grandan lamentadon kaj amaran malĝojon. Ne nur la kristanoj lamentis pro li, sed ankaŭ la judoj kaj paganoj kiuj estis en ĉi tiu urbo.

Reĝo Abgar lamentis pro li pli ol ĉiu alia, li kaj la ĉefuloj

(T)addaj

de lia regno. Kun malgajego li forlasis sian reĝan honoron, tiutage, kaj kun larmoj li ploris kun ĉiu pri li. La popolo de la tuta urbo kiuj lamentis miregis ke li tiom lamentas lin. Kun granda honoro kaj gloro li akompanis kaj enterigis lin, kvazaŭ li estus unu el la nobeloj mortinta, kaj metis lin en grandan tombon ĉizitan kaj ornamitan kiel tiuj en kiujn metiĝis la anoj de la familio de Arju (la prapatroj de la patro de Reĝo Abgar). Tien li metis lin kun malĝojo kaŝ malgajo granda.

La tuta kongregacio fojfoje iris preĝi tie intense, kaj memoris pri li de jaro al jaro, laŭ la ordono kaj instruo kiun ili ricevis de la apostolo Addaj, kaj laŭ la decido de Aggaj, kiu estis la estro kaj heredinto de la episkopeco post li pro la pastreco kiun li ricevis de li antaŭ ĉiuj homoj.

POEZIO HEBREA: KELKAJ PENSOJ

de Donald Broadribb

Multaj legantoj de la Biblio, kleraj kaj nekleraj, rezistas literaturan analizon de la legata materialo. Eble kiel rezulto de la epoko kiam laŭlitera kompreno estis la ŝlosilo al studo de la Biblio, analizado de literaturaj formoj ankoraŭ ne frape influis la publikon (se ni esceptas la bibli-kritikistojn mem).

Se oni ja povas diri ke ekzistas “ŝlosilo” por kompreni la Biblion, certe granda parto de tiu ŝlosilo estas asimilo de la pensmetodoj de la verkintoj. Necesas koni ne nur la historian fonon, ne nur la geografion kaj sociologion de la koncerna regiono, sed eniri la menson de la verkintoj de la legata materialo kaj vidi per iliaj okuloj. Por tio, plena kompreno de *kion* ili diras estas suplementenda per kompreno pri *kiel* ili diras ĝin. Kvazaŭ necesas ne plu esti observantoj kaj, anstataŭe, iĝi partoprenantoj en la pensado de la verkintoj.

Kiel tio estas ebla? Efektive, kiam ajn ni legas ion vere signifoplenan por ni, ni faras precize tion. La spuro kiu indikas la influon de la aŭtoro sur nin estas lia kapablo konvinki nin ke li verkas, ne pri imagitaj personoj aŭ eventoj, sed pri nia propra situacio kaj ni mem. Ke la Biblio sukcesis resti potenco dum preskaŭ 2000 jaroj, tion kaŭzis precize la fakto ke, malgraŭ la ŝajno, ĝi pritraktas ne nur nomojn, datojn, kaj eventojn de la historio, sed ankaŭ nin.

Tamen, neniu el ni volus pretendi esti plenĉerpinta la valorojn de la Biblio, ke li nun pretas iri al alia fonto. Ĉar, tute kontraŭe, ĉiu leganto devas konfesi ke pli estas trovebla. Sed kvankam ni konfesas tion, nin renkontas la problemo formeti la kovraĵon de libro nun 2000 jaraĝa. Du solvoj prezentas sin al ni. Unue, ni povas tiri la libron al nia propra nivelo, modernigi ĝin. Interpreti kion ĝi diras per modernaj terminoj. Ni ofte renkontas tiun metodon, speciale en

porinfanaj libroj pri la Biblio, kaj ankaŭ en popularaj romanoj pri bibliuloj. Alia solvo estas eduki nin, plilarĝigi nian propran komprenon por ke ni povu trovi signifon en tio kio antaŭe estis tro profunda por ni.

La literatura karaktero de biblia materialo estas granda obstaklo venkenda, en nia edukiĝo. Simple, tio estas evidenta: ni nun komprenas kiel absurde estis, iam, legi poemojn kvazaŭ temus pri historio, parabolojn kvazaŭ temus pri biografio, legendojn kvazaŭ temus pri atestitaj eventoj. Nun ni povas ridi kiam iu volus trovi la hotelon kie loĝis la “Bona Samaritano;” la ordono de Joŝuo ke la suno haltu ne plu estas fonto de astronomia informo por ni; kaj ni neniel serioze pensas pri personoj kiuj entreprenas serĉi la ŝipon de Noa. Sed kiam temas pri ne egale simplaj aferoj, ni ne plu certas.

Ekzemple, ankoraŭ multaj personoj ne agnoskas ke la dirojn de Jesuo en la Nova Testamento la verkintoj plejparte faris poeziaj. Eĉ post la populara publikiĝo de la *Evangelio laŭ Thomas*¹ (kiu legas ĝin certe konvinkiĝas ke ni legas semidan poezion), oni plu kutimas legi la dirojn kvazaŭ prozon. Aliflanke, ni kutime aŭdas (eĉ de bibli-komentarioj) komentojn pri la “poemo pri Noa,” kvankam tiu rakonto estas plene proza.²

Kiel gravas rekoni, kaj, egale, analizi biblian poezion? Kiel tio povas helpi nin kompreni la materialon? Kiel tia studo pliproksimigas nin al la menso de la verkinto?

Same kiel estas necese, kaj aŭtomate, legi kuir-recepton alimaniere ol ĵurnal-raporton; same kiel leganto de detektiva romano multe pli ĝuas ĝin se li klopodas sekvi la konstruon de la rakonto en la menso de la verkinto; ankaŭ ni pliprofundigas nian komprenon kiam ni komprenas kiel la biblia poeto parolas al ni, kaj ne nur kion li parolas. Kelkaj ekzemploj povas montri tion:

Ripeto estas la koro de hebrea poezio.³ Se oni komprenas tion, oni komencas kompreni la tekston. Ripeto estas la koro de “paralelismo,” kvakam ĝi troviĝas ne nur tie. Paralelismo, la plej evidenta kaj eble plej esenca elemento en hebrea poezia strukturo, estas vere nenio pli ol ripetado de pensoj. Foje la ripeto estas tre detala, tiel ke ĉiu vorto trovas sian ĝemelesprimon; foje la ripeto estas ne de pensoj sed de vortoj mem; foje la ripeto estas nur de bildo aŭ impresio. La diferencoj estas stil-diferencoj, kaj la manipulado respondecas pri la efekto. Sed la ripeto mem estas esenca. Ekzemple:

*mn 'rm jnĥnj blq
mlk mw'b mhrrj qdm*

El Aram min kondukis Balaq,
la reĝo de Moab for de la orientaj montoj

*Ikh 'rh lj j'qb
wlkh z'mh jisr'l
mh 'qb l' qbh 'l*

Iru, malbenu por mi Jakobon
iru, kondamnu Israelon.
Kiel mi malbenus kiun ne malbenis Dio?

wmh 'z'm l' z'm jhwh

Kiel mi kondamnu kiun ne kondamnis Jahŭe?

*kj mrš crjm 'r'nw
wmgb'wt šwrnw
mj mnh 'pr j'qb*

Ĉar de la roksupro mi vidas lin,
de la montetoj mi rigardas lin.
Kiukalkuluslapolvonde Jakob?

wmspr 't rb' jsr'l

Nombrus la grajnoj de Israel?⁴

*tmt npšj mwt jsr'l
wthj 'hrjtj kmhw*

Mi mem mortu kiel Israel,
Estu mia fino kiel ĝia.

(Nombroj 23:7-10)

Du specojn de ripeto ni tie trovas, ripeton en la linio kaj ripeton inter linioj. La ŝlosilvortoj *j'qb* kaj *jisr'l* aperas ne nur dufoje sed trifoje (dufoje senŝanĝe, poste per la pronomo “ĝi”/“li”). Post la ripeto de ĉiu penso en la linio, la linioj mem estas kunligitaj per ripeto de la ŝlosilvortoj.

Elementa leciono trovenda per tio estas ke ni devas esti pretaj por la ripeto, ne trovi ĝin surpriza. Multaj el ni konas la faman sekcion en Mateo, kie poezian parton de Zeĥarja la aŭtoro legis kiel histori-aŭguron, kaj li ne rimarkis la karakteron de la ripeto:

<i>eipate te thugalri sion idou</i>	Diru al Cion-urbo: jen
<i>ho basileus sou erĥetai soi</i>	via reĝo venas al vi.
<i>praus kai epibebekos epi onon</i>	Milda, kaj rajdantasurazeno,
<i>kai epi polon poreuthentes de</i>	kaj sur azenido. Irinte,
<i>hoi mathetai kai poiesanies</i>	kaj farinte
<i>kathos sunetaksen autois ho</i>	kiel Jesuo ordonis
<i>iesous</i>	al ili,
<i>egagon ten onon</i>	la disĉiploj venigis la azenon
<i>kai ton polon kai epethekan</i>	kaj la azenidon, kaj metis
<i>epano auton ta himatia auton</i>	sur ilin siajn vestojn
<i>kai epekathisen epano auton</i>	kaj li sidiĝis sur ilin. >">

(Mateo 21:5-7)

La malnovtestamentan citon miskomprenis la verkinto, pro kio multe suferis lia rakonto pri Jesuo.⁶ La aliaj tri evange-li-aŭtoroj bone komprenis la tekston:

<i>gjlj m'd bt cjwn</i>	Ĝojegu, Cion-urbo,
<i>hrj'j bt jrwsłm</i>	gajkriu Jerusalemon-urbo:
<i>hnh mlkk jbw' Ik</i>	Jen venas al vi via reĝo.
<i>cdjq wnws' hw'</i>	Gracia kaj venkoplena estas li,
<i>'nj wrkb 'l ĥmw'r</i>	Konkeranta, rajdantasur
<i>w'l 'jr bn 'tnwt</i>	azeno,
	sur ido, azenido. ⁷

(Zeĥarja 9:9)

Se ni sukcesas trovi kio okazis pri tiu teksto, ni devas egale sukcesi eviti similan eraron:

<i>h'zjnw hšmj'm w'dbrh</i>	Aŭskultu, ĉielo, ĉar mi parolos:
<i>wtšm' h'rc 'mrj pj</i>	Atentu, tero, miajn vortojn —
<i>j'rp kmṭr lqĥj</i>	Abundu kiel pluvo mia instruo,

*tzl ktl 'mrtj
kš'jrjm 'lj dš'
wkrbjbjm 'lj 'sb*

falu kiel roso miaj vortoj
Kiel torento sur la herbaron,
kiel tempesto sur la plantaron.

(Readmono 31:1-2)

Ni do ne klopodas, erare, trovi kian specialan rolon havas la tero kontraste kun la ĉielo, en la cito.⁸

Simile, kiam ni legas:

*paterhemonhoentoisouranois
hagiastheto to onoma sou
eltheto he basileia sou
genetheto to thelema sou
hos en ourano
kai epi ges
ton arton ton epiousion
dos hemin semeron
kai afesheminta ofeilemata
hemon
hos kai hemeis afekamen tois
ofeiletais hemon
kai me eisenenkes hemas eis
peirasmon
alla rusai hemas apo tou
ponerou*

Nia patro en la ĉielo,
sankta konsideriĝu via nomo.
Venu via regado,
plenumiĝu via deziro, Same
kiel en la ĉielo
tiel sur la tero.
Nian bezonotan manĝon
provizu por ni hodiaŭ.
Nuligu niajn ŝuldojn
same kiel ni nuligis por
ŝuldantoj al ni.
Ne okazigu por ni tenton,
liberigu nindelaMalbonulo.

(Mateo 6:10-13)

ni ne klopodu scii kial Dio ja okazigus por ni tenton, kaj ni ne kontrastus je tio lian savpotencon; ankaŭ ni ne diros ke la parto pri ŝuldoj devas esti apokrifa, ĉar ĝi supozigas ke Dio pardonas nur kiel rezulto de nia propra pardonado.⁹

Krom la simpla ripetado en linioj, kiu emfazas, klarigas, impresas, kc. laŭ la volo de la poeto, ekzistas pli kompleksa ripetado inter linioj. Tion ni vidis en la Nombroj-teksto, ĝi evidentas ankaŭ en la Readmono-teksto (kie ĉiu linio estas ligita al la antaŭa linio, tiel ke malfacile oni povas ĉesigi la

elkopiadon antaŭ ol fini la tutan poemon). Speciala signifo de rekono pri tia ripetado estas la eblo trovi poezi-unuojn.

Influite, probable, pro la fakto ke malnovaj Bibliojoj kutime presis ĉiun version kiel apartan paragrafon,¹⁰ legantoj de la Biblio, komentariistoj,¹¹ kaj presistoj malrapide lernas la simplan fakton ke frazoj estas kunligitaj. Biblimanuskriptoj kutime kunpuŝas la tutan tekston, kaj ne apartigas la diversajn sekciojn laŭ ilia enhavo.¹² Sekve, la moderna studanto devas mem trovi kie devas esti la divid-linioj inter apartaj sekcioj de la teksto. En la profet-libroj, la signifo ofte dependas de ĝuste kie oni trovas la finon de unu poemo kaj la komencon de la posta.

Tre grava por kompreni la verkon de Deŭtero-Jesaja estas la rekono ke la “Servist-Kantoj” ne estas apartaj poemoj puŝitaj en tute fremdan materialon, sed ke ili estas integra parto de longa poem-komplekso. La klimaksa proklamo en 44:28 dependas de, kaj estas integra kun, la komenca proklamo en 40:1. La integreco de la poemo (40:1-44:28, esceptante fremdan materialon en 44:9-20) estas evidenta kiam oni analizas la ripetadon de terminoj tra la tuta teksto, signifoplena ripetado kiu (kiel en la teksto pri Nombroj 23) indikas la strukturon.¹³

Malpli spektakla, sed egale grava, estas la analizo de Psalmo 137:

*l nhrwt bbl ŝm jŝbnu gm
 bkjnu bzkrnw 't cjwn
 'l ' rbjm btwkh tljnw
 knrwtjnu
 kj ŝm ŝ'lwnw ŝwbjnw dbrj ŝjr
 wtwlljnw ŝmĥh ŝjrw lnw
 mŝjr cjwn
 'jk nŝjr 't ŝjr jhwh 'l 'dmt nkr*

Ĉe la babiloniaj riveroj ni sidis
 kaj ploris memorante Cionon,
 Sur ĝiajn arbojn ni pendigis
 niajn muzikilojn.
 Ja tie niaj kaptintoj postulis
 kanton,
 niaj konkerintoj diris “Kantu
 al ni Cionan kanton!”
 Kiel ni kantus Jahŭe en fremda

lando?

'm ŝkĥk jrŵŝlm

tŝkĥ jmjnj

tdbg lŝwnj lĥkj 'm l' 'zkrkj

'm l' 'lh 't jrŵŝlm 'l
rŝ smhtj
zkr jhwh lbnj 'dwm

't jwm jrŵŝlm
h'mrjm 'rw 'rw 'd hjswd bh

bl bbl hŝdwdh ŝrj ŝjŝlm lk
't gmwlk ŝgmlt lnw
ŝrj ŝjĥz wnpc 't 'lljk
'l hsl'

Kiel Morgenstern indikis,¹⁴ la Psalmoj konsistas el du poemoj, kiuj konsekvence estas aparte legendaj. La unua poemo, kiu daŭras en la linio komencata per 'm l' 'lh estas karakterizata de ripeto simila al tiu jam notita. La ŝlosilvortoj zkr kaj jrŵŝlm, kaj la verbformo "mi" montras la limojn de la poemo. La poemon sekvas dua poemo en kiu aperas la du ĉef-terminoj en la komenclinioj (tiel oni facile memoris ĝin), sed en kiu ili ne estas ŝlosil-vortoj.¹⁵

Alia ekzemplo kie la signifo de teksto dependas de la kapablo de la leganto trovi la limojn de la teksto:

wj'mr h'dms

z't hp'm 'cm m'cmj

wbŝr mbŝrj

lz't jqr' ŝh

kj m'jŝ lqĥh z't

'l kn j'zb 'jŝ 't 'bjw w't

'mw wdbq bŝtw whjw lbŝr 'hd

Se mi forgesus vin,
Jerusalemo,

forgesiĝu mia propra
dekstra mano!

Gluiĝu mia lango al mia pa-
lato se mi ne memoros vin!

Se mi ne faros Jerusalemon la
sola ĝojigo por mi!

Memoru Jahŭe la Edoman-
ojn!

La Tagon de Jerusalem!
Ili diris "Detruu ĝin al la fun-
damentoj!"

Babilono: benata estos kiu
afliktos vin kiel vi afliktis nin,
Benata estos kiu prenos
viajn bebojn kaj ilin frakas-
os sur la rokoj!

La Homo diris:

Ĉifoje jen unu el miaj ostoj,
karno el mia karno.

Tial ŝi nomiĝos Virino,
ĉar ŝi preniĝis el Viro.

Tial homo forlasas sian patron
kaj patrinon, ligiĝas al sia

edzino, kaj ili iĝas unu persono.
(Genezo 2:23-24)

Estas klare ke la poemo konsistas el kvar mallongaj linioj, kiel supre montrite. La ripetado kiu montras la limojn de la teksto ne estas, nun, ripeto de vortoj sed de gramatiko kaj de stilo (la temo “io venis el...”). La frazo post la poemo estas komento.¹⁶

Kvankam ni ne plene diskutis la rolon de ripetado, ni nun turnu nin al alia, parenca, karaktero: la poezia linio. Tipaj, ne ĉiam, de biblia poezio estas la du-partaj linioj, kiel estas evidente pro la specimenoj jam donitaj. Kutime, bibli-manuskriptoj ne dividas la materialon laŭ la linioj, kaj la mo-derna leganto devas mem fari tion.¹⁷ La neceson rekoni la karakteron de la linioj montras klasika ekzemplo:

<i>houtos gar estin ho retheis dia</i>	Ĉar tion diris
<i>hesaiou tou profetou legontos</i>	la profeto Jesaja:
<i>fone boontos en te eremo</i>	“Voĉo proklamas en la dezerto:
<i>hetoimasate ten hodon kuriou</i>	‘Pretigu la vojon de la Mastro,
<i>eutheias poieite tas tribous</i>	rektigu lian irejon.”
<i>autou.</i> ¹⁸	

(Mateo 3:3 = Luko 3:3 = Marko 1:3 = Johano 1:23)

La malnovtestamenta teksto estis miskomprenata, rezulte ke oni malfacile scias ĉu oni modifis la tekston por ke ĝi estu aplikebla al Johano la Baptisto, aŭ ĉu oni modifis la rakonton pri Johano la Baptisto por ke ĝi ŝajnu plenumi la supozitan tekston profetan. La hebrea profeta teksto estis:

<i>qwl qwr'</i>	“Voĉo proklamas:
<i>bmdbr pnw drk jhwh</i>	“En la dezerto pretigu la vojon de Jahŭe,
<i>jšrw b'rbh mslh l'lhjnw</i>	preparu en la senloĝejo straton por nia dio.

(Jesaja40:3)

La poezis linio komenciĝas per bmdbr (dezerto); tion pruvas la paralela b'rbh (senloĝejo).

El la sama poemo:

<i>hn 'bdj 'tmk bw</i>	Jen mia akirita sklavo,
<i>bĥjrj reth npŝj</i>	elektita ĉar mi deziras lin.
<i>nttj rwĥj 'ljw</i>	Mi metas en lin mian spiriton,
<i>mŝpŭ lgwjm jwcj'</i>	por porti juĝon kontraŭ la
	nacioj.
<i>l' jc'q wl' jŝmj' bĥwc qwlw</i>	Li ne krios, li ne laŭtos,
	li ne proklamos en la strato.
<i>qnh rcwc l' jŝbr</i>	Kanon rompitan li ne plurompos,
<i>wpŝth khh l' jkbnh</i>	fumantan meĉon li ne estingos.
<i>lmt jwcj' mŝpŭ</i>	Por vero (fidele?) li portos juĝon,
<i>l' jkhh wl' jriwc</i>	li ne.....(teksto ne sencoplenta)
<i>'d jŝjm b'rc miŝpŭ</i>	Ĝis li venigos juĝon al la tero,
<i>wltwrtw 'jjm jjĥlw</i>	kaj eĉ la marbordoj volos lian
	instruon

(Jesaja 42:1-4)

La koncepto, ke “eĉ la marbordoj volos lian instruon” estas rezulto de la ago de la sklavo, parto de la eskatologia evento (kutima bildo en profeta literaturo), ne priskribo de la situacio jam okazanta dum la agado de la sklavo. Tion oni komprenas nur se oni scias ke la lasta frazo estas la dua parto de linio, sekve interpretenda ligite kun la unua parto.

Tre detala senc-distingo en Psalmo 2 dependas de la ĝusta kompreno de la linioj:

<i>'sprh 'l ĥq jhwh</i>	Mi rakontu la dekreton de Jahŭe:
<i>'mr 'lj bnj 'th</i>	Li diris al nii: “Vi estas mia filo,
<i>'nj ĥjwm jldtjk</i>	Hodiaŭ mi naskigas vin.
<i>ŝ'l mmnj</i>	Petu de mi,
<i>w'tnh</i>	mi ja donos.
<i>gwjm nĥltk</i>	Nacioj estas viaj posedaĵo,

w'hztk 'psj 'rc

via propraĵo estas la terfinoj.”

(Psalmo 2:7-8)

La tradicia interpreto estas “Petu de mi, mi ja donos al vi naciojn kiel vian posedaĵon.” Tiel la posedo dependas de la peto. En la verzio donita supre, la teksto estas proklamo pri la suvereno de la reĝo, ne la teksto de promeso farita al la reĝo.

Preter tio, t.e. la montrado pri ripetado, pri linioj, pri poem-unuoj, ni ne povas ekzameni sen preciza tekstanalizo. Ĉar pri aliaj elementoj estas granda malakordo inter studentoj. Nun ni povas opinii ke la ekzameno estas sufiĉa por subteni la deklaron ke kompreno de la materialo rekte dependas de kompreno pri kaj influo de la formo de la materialo. La tradukinto aŭ redaktoro povas multe helpi la komprenon. Li povas, ekzemple, provizi por la leganto dividon laŭ linioj kaj linipartoj. Li povas distingi la partojn de la teksto (kvankam oni preskaŭ neniam ja faras tion en presitaj Bibliojoj). Tamen, la leganto mem devas kompreni la sencon de tiuj formoj.

La pravigo de ĉiu bibli-kritikado estas ke ĝi celas pli profundan komprenon de la pensado de la aŭtoroj. Ofte ŝajnas, surface, ke la kritikado konsideras nur temojn mal-konkretajn, malmulte konektitajn al la Biblio mem. Sed, post zorga ekzameno, oni kutime vidas ke kio unue ŝajnis senrilata efektive estas la koro de kompreno.

Notoj

1. Unua angla eldono, red. A. Guillaumont, H. -Ch. Puech, G. Quispel, W. Till, Yassah 'Abd al Masih, Leiden (Brill) kaj Novjorko (Harper & Brothers), 1959.
2. La fonto de la Noa-rakonto, la Gilgameŝ-eposo, ja estas poezio, sed tio ne koncernas nin nun.
3. Vidu James Muilenburg: "A Study in Hebrew Rhetoric," en *Supplements to Vetus Testamentum, Congress Volume 1953*, Leiden, 1954, pp. 97-111
4. Oni kutime agnoskas ke ĉi tie la teksto estas difekta. Mi estas konvinkita ke oni nun ne plu povas scii la originalan formon de la teksto; sed la tradicio redonis al ĝi la necesan poezi-formon, malgraŭ ĝia sencmanko.
5. La gramatika formo epano auton indikas ke "sur ilin" devas koncerni la azenojn, ne la vestojn.
6. Nome ke laŭ la teksto de Mateo Jesuo devis samtempe rajdi du azenojn.

7. La evangeli-aŭtoroj, kompreneble, legis ne la hebrean sed la grekan tekston. Tial ili ne plene ĝuste redonis la sencon de la adjektivoj en la hebrea teksto. Malgraŭ kristana tradicio, kiu prenis siajn ideojn ne rekte el la zeĥarja teks-to, la hebreaj adjektivoj estas pozitivaj: gracia, venkoplena, kc. kaj ne negativaj (humila, kc). La traduko “konkeranta” por ‘nj supozigas la aktivan sencon de la radiko ‘nh — subpremi, konkeri. Azeno ne estis signo de humileco, sed estis la kutima rajdbesto en Palestino. Oni nun ne scias al kiu celis la zeĥarja teksto, sed probable temis pri unu el la pluraj klopodoj starigi la monarkion denove en Judujo dum ĉ. la 4a aŭ 3a jarcentoj a.K. Ke ĝi koncernas Aleksandron “La Grandan” estas ofte sugestite, sed necerte.
8. Tian klopodon efektive raportas G. Ernest Wright: “The Lawsuit of God,” en *Israel’s Prophetic Heritage* (Red. B. W. Anderson kaj W. Harrelson), Londono, 1962, p. 46.
9. Vidu Rudolf Bultmann: *Jesus and the Word*, Londono, 1958, p. 129. Kaj ankaŭ Karl Kundsins: “Primitive Christianity in the Light of Gospel Research” en Bultmann kaj Kundsins: *Form Criticism* (Red. Frederick C. Grant), New York, 1962, p. 90.
10. Iam, post la apero de la kompleta *Revised Standard*

Version, mi montris ekzempleron al knabino en dimanĉ-lernejo. Ŝi antaŭe konis nur la malnovan King James verzion. “Ho!” kriis ŝi tre surprizite, “oni presis ĝin kvazaŭ ĝi estus vera libro!”

11. Tipa ekzemplo, relative bona, estas la nova eldono de *Peake's Commentary on the Bible* kiu konsistas plejparte el komentarioj pri individuaj versoj. Kvankam verkita de modernaj ekspertoj, nur malmultaj el ĝiaj komentarioj pritraktas tutajn tekst-sekciojn anstataŭ individuajn frazojn.
12. La mortmara manuskripto IQIsa, eldonita en 1950 de Millar Burrows, estas eble escepto. Por detaloj, vidu Donald Broadribb: *An Attempt to Delineate the Characteristic Structure of Classical (Biblical) Hebreiv Poetry* (ne-eldonita doktora tezo, Melbourne), ĉap. 4.
13. Pri tio konsultu la artikolon de James Muilenburg (noto 3, supre), kiel ankaŭ ĉapitron 3 de la libro menciita en noto 12.
14. Julius Morgenstern: "Jerusalem, 485 B. C.," en *Hebreto Union College Annual*, Cincinnati, 1956, p. 145.

15. La distingo inter la du poemoj, kompreneble, ankaŭ estas evidenta per la abrupta ŝanĝo de gramatiko kaj de stilo, ekz. per la ekuzo de ŝ, kaj la l kiu montras rektan akuzativon.
16. Monsinjoro Ronald Knox ne komprenis tiun karakteron de la hebrea poezio, kaj tial li skribis en piednoto al sia bibli-traduko: “Estas ne certe, ĉu tiuj vortoj estas metitaj en la buŝon de Adamo, aŭ ĉu ili estas komento de la aŭtoro.” Ĝenerale, en sia tuta biblitraduko, Knox ne distingis inter prozo kaj poezio.
17. Escepto estas pluraj mortmaraj tekstoj. Pri ili, vidu la verkon menciitan en noto 12.
18. Efektive, la tekston citis la evangeli-aŭtoroj el la Septuaginto. La septuaginta teksto estas legebla tiel ke “en la dezerto” aplikeblas aŭ al la antaŭa aŭ al la posta linioj. Ŝajne la perdo de kompreno pri poezia formo rezultigis la strangan bildon de Johano predikanta en la dezerto.